



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
96-a jaro • n-ro 1157 (3) • **Marto 2003**

Gotenburgo: la venonta UK-urbo

La 3-a Monda Socia Forumo

Favora opinio en Bruselo

Nia diligenta kolegaro



*Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)*

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:
Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎ +421 43 4222 788
✉ revuo@uea.org, marcek@esperanto.sk

Aperas:
en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:
la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 32); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO. Unuopa ekzemplero kostas EUR 3,00.

Anoncarifto (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90. Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe Postbank, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam (IBAN: NL24PSTB0000378964

SWIFT: PSTB NL21)
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank, Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam (IBAN: NL66ABNA0426051599
SWIFT: ABNA NL2R).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

☎ +31-10-436-1044, ☎ +31-10-436-1751, ✉ uea@inter.nl.net

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Trevor Steele.



en tiu ĉi numero konfeson de eksa volontulo, ke li tute ne elreviĝis post kiam plenumiĝis lia revo voluntuli ĉe UEA, kaj ke li trovas nian kolegaron en la Centra Oficejo – diligenta. En la marta numero vi trovos informojn pri la ĉi-jaraj UK-urbo kaj -lando, vi eksos el intervjuo kun Renato Corsetti, ke en Bruselo favorigas opinioj pri Esperanto, legos novajn informojn el la “eŭropa ĉefurbo” kaj vidos (sur belaj koloraj fotoj), kion faris esperantistoj dum la 3-a Monda Socia Forumo en Porto Alegre... La *Kalendaro* malkaŝos al vi, kiaj E-aranĝoj atendas vin en 2003, kaj la rubriko *Tra la mondo* kio interesa jam okazis... Kiel kutime ne mankos recenzoj, novaĵoj en via *Libroservo*, *Oficialaj Informoj*, *Loke-Fake-Persone*, *Krucenigma*... Via redaktoro intertempe komplete resaniĝis kaj klopodas resanigi ankaŭ la aper-ritmon. Bonan legadon!

Enhavo

- 51 Malferme: Nia diligenta kolegaro (Doron Modan).
- 52 Gotenburgo, la venonta UK-urbo (Christer Lönnemark).
- 54 La ĝenerala opinio pri Esperanto fariĝas favora en Bruselo. (Renato Corsetti/Marko Naoki Lins).
- 55 Informoj el Bruselo: Tago de la Gepatra Lingvo (Dafydd ap Fergus).
- 56 Esperanto en la 3-a Monda Socia Forumo (José Antonio Vergara).
- 57 Forpasis Lou Harrison (David Gaines).
- 58 Demisia etoso ĉe TEJO (Marko Naoki Lins).
Satio: 65-jara infano preta por pensiĝi! (Teĉjo Ueanjo).
- 59 Kalendaro 2003.
- 62 Recenzoj: Antonio de Ruijter pri *La Ĉevalo de Motizuki*. Ilona Koutny pri *Grosses Wörterbuch Esperanto-Deutsch*. John Wells pri *Tri pri la Tria*. Reago de Carlo Minnaja.
- 64 Strategia kaj Terminologia Forumoj (Detlev Blanke).
- 65 Laste aperis.
- 66 Loke-Fake-Persone.
- 67 Oficiala informilo. Laste aperis (daŭrigo). Anoncojeto.
- 68 Tra la mondo: Filatelaj kovertoj el Kroatio. Ertl malkontenta. Kie okazos kio?
- 69 Japana karto. Ĝangalo: ĉiutagaj novaĵoj en nia lingvo.
Esperanto alvenis al Paragvaĵo.
- 70 Biblioteko Hector Hodler: Esploroj por la estonteco.
Krucenigma konkurso (Stano Marček).

FRONTPAGE: Nokta Gotenburgo, la venonta UK-urbo: la enirejo al la Kongrescentro promesas al la ĉi-jaraj kongresanoj multajn travivaĵojn (legu sur la p. 52). Foto: arkivo.

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (strategia forumo, Unesko): d-ro Renato Corsetti, Via del Castello 1, IT-00036 Palestrina, Italio; ☎ +39-06-957-57-13; ☎ +39-06-957-66-33; ✉ renato@esperanto.org.

Vicprezidanto (strategia kaj planado, esploro kaj dokumentado, UN Novjorko): prof. Humphrey Tonkin, 279 Ridgewood Road, West Hartford, CT 06107 Usono; ☎ +1-860-561-26-69 [h]; ☎ +1-860-561-52-19 [h]; ☎ +1-860-768-44-48 [of]; ☎ +1-860-768-44-11 [of]; ✉ tonkin@mail.hartford.edu.

Vicprezidanto (eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Resp.; ☎ +82-53-765-0880 [h]; ☎ +82-53-652-4488 [of]; ☎ +82-53-652-8141 [of]; ☎ +82-53-765-0881 [h]; ✉ lee@esperanto.net.

Ĝenerala sekretario (faka agado, rilatoj kun TEJO, rilatoj kun la Komitato, kongresoj, Nobel-kampanjo): s-ro Ivo Osibov, Vinkovačka 25, HR-21000 Split, Kroatio; ☎ +385-(0)21-535-650 [h];

+385-(0)21-355-550 [of]; ☎ +385-(0)21-393-597 [of]; ✉ osibov@provst.hr.

Financo, administrado: s-ino Ans Bakker-ten Hagen, Kastelenstr. 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando; ☎ +31-(0)20-642-18-53; ✉ ans.bakker@esperanto.org.

Eduko, kulturo, ILEI-rilatoj, sporto, afrika agado: s-ro Gbego Koffi, B.P. 13169, Nyekonakpoe, Lomé, Togolando; ☎ +228-227-21-17; ✉ esp.togo@cafe.tg.

Informado: s-ro Andrej Grigorjevskij, ul. Lenina 40-14, RU-429120 Ŝumerlja, Ĉuvaŝa Respubliko, Rusio; ☎ +7/83536/59856; ✉ andreo@mail.ru.com.

Landa agado: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-06-39-72-61-98; ☎ +39-06-39-72-61-69; ✉ michela.lipari@esperanto.org.

Observanto de TEJO: s-ro Marko Naoki Lins.

Observanto de ILEI: s-ro Mauro la Torre.

Nia diligenta kolegaro

Doron Modan

Volontuli por UEA en ties Centra Oficejo estis mia malnova revo. Antaŭ ses jaroj oni proponis al mi kandidatiĝi kiel TEJO-volontulo, sed min interesis la pli ĝenerala bildo pri nia asocio. Lastsomere mi sukcesis vojaĝi Roterdamon. Alveninte el Israelo, kie busoj ne subite eksplodas, kaj kie ĉe kafejoj ne staras gardistoj, mi komence trovis Roterdamon preskaŭ stranga... Sed al trankvila etoso oni ja alkitimiĝas rapide.

Mia rekta labordonanto kaj amiko estis Simo Milojević, kiu instrukiis min kiel kompili la komputilan katalogon de brokantaroj. Sed laboro en la CO neniel signifas fari unusolan aferon. Mi vizitadis la poŝtoficajn, portis librojn en la stokejon, enarkivigis, trovis petatajn informerojn en la biblioteko, eĉ verkis recenzon por *Esperanto*... Mia laboro ne estis unika. Ĉies laboro en la CO estas multfaceta, kaj oni volonte helpas unu la alian. Trevor liveras sian ekzemplon, helpante en krizaj horoj pri simplaj taskoj, kiuj certe ne estas parto de la direktora laboro.

Nekredeblan multegon eblis lerni dum la laboro, sed la spirito de la movado eblis ekhavi dum la mitologiaj kafopauzoj je 10:30 kaj 16:00 (precize, neniam unu minuton antaŭe aŭ poste!). Dum la trinkado oni parolas pri ĉio ajn. Sendube tiuj paŭzoj forte kontribuas al la hejma, harmonia etoso de la loko. La neoftaj okazoj kiam oni tuŝis la movadon en interparoloj, estis interesejaj. Per iom da imago, eblas similigi al si la rilatojn inter UEA kaj TEJO al klasikaj rilatoj de patro kaj filo: la filo postulas helpojn de la patro, sed rifuzas aŭskulti liajn kondiĉojn kaj konsilojn. La rilatoj inter la Estraro kaj la CO estas kiel inter la klasikaj supera mastro kaj laboristoj. La mastro havas klarajn ideojn pri la laboro, sed sentebas la neceso, ke li elklaru la surlokajn faktojn, eĉ laborante kun la laboristoj dum kelkaj plenaj tagoj.

Dum miaj taskoj mi relernis pri kelkaj servoj de UEA, pri kiuj mi estis nur parte konscia. UEA ofertas bonegajn servojn, sed ĝi estas tro modesta.

Ĉu multaj scias, ekzemple, ke la CO eldonas la revuojn *Informilo Por Interlingvistoj* kaj *Familia Esperanto*, interesejajn por preskaŭ ĉiu esperantisto (malgraŭ la neallogaj nomoj), sed tamen abonas ilin mirinde malmultaj? Ke kontraŭ fiksita monsumo eblas ricevi fotokopiojn el amaso da E-revuoj, eĉ raraj aŭ malnovaj? Ke eblas aĉeti trezorajn brokantajn librojn,

jam delonge elĉerpiĝintajn? Kaj eĉ, kioma procentaĵo el la membraro uzas sian UEA-konton kun ties avantaĝoj? Nu, ĉio ĉi aperas en la Jarlibro, sed oni devus aktive informi pri la servoj, precipe al neaktivaj membroj, kaj al nemembroj. La fakto, ke la ŝildeto ĉe la enirejo al la centro de Esperantujo,

indikanta *Universala Esperanto-Asocio* estas mirige eta, apenaŭ rimarkebla, aspektas simptomo pri la nedezirinda modesteco de UEA.

La domo mem estas jam preskaŭ kaduka. Konstruita en 1887, samjare kun Esperanto, ĝi suferas de problemoj. Unu matenon mi ellitiĝis, trovante nenium en la oficejo. Atie kaj Katja estis elirintaj tra la

fenestro sur la tegmenton, starantaj meze de basenego pro la nokta pluvo. Ĉar la akvo damaĝas la malnovajn murojn, dum du horoj ni troie forigis la akvon per balailoj. Elektraj problemoj endanĝerigas la ĉeestantojn en la domo. Cetere, tie estas enarkivigita la tuta historio de nia movado. Se troviĝus la necesa monrimedo, oni rapidege translokiĝus.

Malsame al la fizika stato de la domo, la homa materialo estas treege bonkvalita. Kleraj kaj amikemaj estas la oficistoj, kio ebligis interesajn konversaciojn kun ĉiuj el ili, pri multaj temoj. Sed dum laborhoroj mi neniam vidis oficiston ripozi eĉ por momento, ja laboro tro abundas. Fojfoje mi emis konsili al Trevor, Marvin, Katja, Nikola, Simo aŭ Ionel (fakte al kiu ne?) ke ili ne laboru tiom streĉe, sed mi scias, ke se ili permesus al si ripozi, la laborstreĉo nur pliĝus. Rob kaj Ina, kiuj memvole helpegas, ne sukcesas tamen solvi la problemon de troa farendaĵo. Pluraj oficistoj, precipe tiuj loĝantaj en, aŭ apud la Oficejo, laboras ĝis malfruaj horoj, multfoje nokte kaj semajnfine! En tia fervora etoso ankaŭ mi sentis ke estas kvazaŭ nature foje labori en nekutimaj horoj. Malgraŭ ĉiame maratona laboro, foje alvenis plendoj de membroj.

Vidante deproksime la klaran mankon de homforto, mi ne miris, kaj tamen mi ricevis impreson de tre glata laboro.

La oficistoj bone scias, ke mi korigiĝis al ili, kaj ke mi volonte revenos iam por vizito, ĉar mi trovis ĉe ili ĝuste tion, kion oni serĉas en tiaspeca laborejo: amikecon, seriozecon, mal-amatorecon, intelekton, kaj plej grave: laboremon. Danke al tiu diligenta kolegaro, fervoraj E-aktivuloj dise en la mondo sciuj, ke ili ne estas solaj. *



Doron Modan

Gotenburgo la venonta UK-urbo

Göteborg (elparolu *jeteborj*) havas ĉ. 450 000 loĝantojn kaj estas la dua plej granda urbo de Svedio. Ĝi apartenas al la gubernio *Västra Götaland* (Okcidenta Gotio), kiu estas aree pli granda ol iuj eŭropaj ŝtatoj kaj havas ĉ. 2 milionojn da loĝantoj. La urbo havas diverslingvajn nomojn: svede *Göteborg* (la oficiala nomo), angle *Gothenburg*, france *Gothembourg*, hispane/itale/portugale *Gotemburgo*, latine *Gotoburg(um)*, Esperante *Gotenburgo*.

La unuaj loĝlokoj en la regiono aperis antaŭ 10 000 jaroj. Tre longe poste formiĝis la tri regnoj Svedio, Norvegio kaj Danio, kaj la gotenburga areo troviĝis en limlando inter ili. (Danio kaj Norvegio konsistigis unu regionon de la 14-a jarcento ĝis 1814.) Antaŭ 1658 la provinco Bohuslän, norde de Gotenburgo, apartenis al Norvegio, kaj Halland, la provinco sude, estis parto de Danio. La sveda teritorio ĉe la marbordo estis nur kelkajn kilometrojn longa. Fortikaĵo tie estis tre valora, kaj teritorie kaj komerce.

Ekde la mezepoko troviĝis kelkaj "praurboj" de Gotenburgo en tiu regiono, unu post la alia: Lödöse, Nya Lödöse, Älvsborg. Kio finis ilin estis la militoj inter Svedio kaj Danio-Norvegio, dum kiuj la praurboj estis forbruligitaj. En 1658 Svedio konkeris tiujn apudajn provincojn kaj Gotenburgo ek troviĝis en la mezo de la sveda okcidenta marbordo.

Gotenburgo mem fondiĝis en 1619 kaj ricevis siajn urbajn privilegiojn en 1621 de la reĝo Gustavo la II-a, Adolfo. Kelkaj



fortikaĵoj kaj restaĵoj de la malnova urbomuro atestas pri la milita historio de Gotenburgo. La origina urbo okupis insulon ĉe la elfluo de la rivero Göta Älv, kiu venas de la lago Vänern. Nederlandanoj kaj germanoj estis granda parto de la loĝantaro en la komenco.

Gotenburgo estas la plej granda havenurbo de Skandinavio; preskaŭ 1/3 el la komerco de Svedio kun la eksterlando iras tra la haveno de Gotenburgo.

Ŝipfarejoj estis granda parto de la industriaro ĉi tie, ĝis la 1980-aj jaroj. Kelkaj mondfamaj industriaj entreprenoj havas siajn sidejojn kaj originon en Gotenburgo: SKF (fabrikanto de globlagroj), Volvo (aŭtoj kaj kamionoj), kaj Hasselblad (fotiloj).

La 88-a UK

Ĝi estos la unua UK en Gotenburgo. Ĉi tie okazis unu skandinava E-kongreso (en 1918), du SAT-kongresoj (en 1928 kaj 1976) kaj unu postkongreso (de UK en Kopenhago en 1975). Sed ĝi estos la kvara UK en Svedio; la antaŭaj okazis en Stokholmo (1934 kaj 1980) kaj en Malmö (1948).

La kongresa kaj ekspozicia centro Svenska Mässan, kie okazos la plej multaj programeroj, troviĝas en la centro de la urbo, kelkcent metrojn de la ĉefa strato Kungälvssavenyn. Ankaŭ la plej multaj hoteloj troviĝas en la centro, ofte je piedira distanco de la kongresejo. Gotenburgo ne havas metron, sed efikan reton de tramoj kaj busoj.

Laŭ sia enhavo UK plejparte similos al antaŭaj UK-oj, sed estas antaŭviditaj kelkaj novigoj. LKK klopodos utiligi la nuntempajn informadikajn eblojn por komuniki parton de la programo ankaŭ al nekongresanoj en diversaj mondpartoj, al tiuj kiuj pro diversaj kaŭzoj ne povos ĉeesti en UK sed tamen havas aliron al Interreto.

Samsomere okazos kelkaj gravaj aranĝoj en ĉi tiu regiono de Eŭropo: IJK en Lesjōfors, (UK,) kaj KEF en Helsingborg/Helsingör, unu post la alia. Okazos du antaŭkongresoj de UK, en Stokholmo kaj en sudorienta Svedio, kaj du postkongresoj, unu en Stokholmo kaj unu en la ferproduktanta parto de meza Svedio. Post UK krome sekvos ILEI-konferenco en suda Svedio kaj blindula kongreso en Gotenburgo.

La Dua Bulteno (kun informoj pri ekskursoj, hoteloj, antaŭaj postkongresoj k.a.) troviĝas en la TTT-ejo de UEA ĉe <http://www.uea.org/kongreso/> kaj ĝi kompreneble ankaŭ ekzistas en presita papera formo.


La gotenburga E-movado

En *La Esperantisto* (la unua E-gazeto) de februaro 1892 troviĝas notico pri la fondiĝo de Esperanto-klubo en Gotenburgo, "La Esperantistoj". Laŭ fondotempo ĝi estis la tria en Svedio kaj la 12-a en la mondo. En la adreso de "La Esperantisto" tiujare troviĝis 25 gotenburanoj. La klubo daŭris almenaŭ du jarojn. Sekvis ĝin aliaj mallongdaŭraj kluboj, fonditaj en 1897, 1907, 1909 kaj 1913, respektive. (Tiu de 1909 estis laborista E-klubo.) En 1918 okazis skandinava E-kongreso en Gotenburgo; unu el ĝiaj rezultoj estis nova E-societo en la urbo. De tiam daŭre troviĝas E-movado en la urbo, plejofte pli ol unu klubo.

Multklubeco estas grava trajto de la gotenburga E-historio. En 1936 ekzistis 13 kluboj/grupoj en la urbo kaj ĝiaj antaŭlokoj. Iuj havis nur kelkajn membrojn, kontraste al ABF:s Esperantoklubb (fondita en 1929), kiu havis ĉ. 300 membrojn. Post la dua mondmilito ekzistis en la urbo 8 E-kluboj. Ili



Celo de unu el la tuttagaj ekskursoj dum la 88-a UK en Svedio estos la kastelo Läckö, unu el la plej famaj barokaj kasteloj de Svedio, gajninto en arkitektura konkurso en 2001 pri la plej bela konstruaĵo de Svedio kaj situanta sur insulo en lago.



malaperis unu post la alia, kaj nun troviĝas nur unu: Esperanto-Societo de Gotenburgo, fondita en 1956 (nun 77 membroj). Dum la jaroj 1892-1992 agadis en Gotenburgo 41 E-organizoj.

En la Urba Biblioteko de Gotenburgo troviĝas ĉirkaŭ 800 E-libroj. Tiu librokolekto estiĝis pro testamentajo de la esperantisto E. S. Nilsson. De 1979 fonduso acetadas librojn por la kolekto. Ili estas deponitaj en la urba biblioteko, laŭ speciala kontrakto, kaj oni povas prunti ilin samkiel oni pruntas aliajn librojn tie. En Svedio kaj en ĉiuj nordiaj landoj eblas prunti librojn de tiu kolekto, per reto da urbaj kaj municipaj bibliotekoj, de Viborg en Finnlando al Rejkjaviko en Islando, de norda Norvegio al suda Danio kaj suda Svedio. Bedaŭrinde malmultaj utiligas tiun eblon; la librojn pruntas la lokaj esperantistoj kaj preskaŭ neniu alia. La plimulto de tiu kolekto troveblas per la katalogo de la urba biblioteko: <http://www.stadsbiblioteket.goteborg.se> (Bedaŭrinde nur svedlingve).

Bonvenon al Gotenburgo!

Christer Lörmemark



La ĝenerala opinio pri Esperanto fariĝas favora en Bruselo

Fine de januaro Renato Corsetti, prezidanto de UEA, je invito de la Eŭropa Komisiono estis en Bruselo dum prepara kunsido por simpozio pri multlingveco en Eŭropo, kiu okazos komence de majo. Ni kaptis la okazon por intervjui lin pri la tieaj rezultoj kaj lia percepto de la pozicio de Esperanto en Bruselo.

☛ En la interret-portalo *Gxangalo.com* oni raportis ke vi ĉeestis konferencon en Bruselo laŭ invito de la Eŭropa Komisiono. Kia estas la antaŭhistorio de tiu ĉi konferenco?

Temis pri preparakunsido por pretigi iun pli ĝeneralan simpozion pri multlingveco en la institucioj de la Eŭropa Unio kiu devos okazi iam. Fakte la problemoj rilatas al la pliiĝo de la membroŝtatoj en la Eŭropa Unio kaj al la timo de kelkaj oficejoj kaj branĉoj de la Unio ke ili ne povas trakti laboron en kromaj lingvoj. Reage ili volas eĉ pli limigi la lingvojn, kiujn ili devas uzi. Sed tio estas kontraŭ la ĝenerala atendo de la fakuloj kiuj estis ĉe la konferenco.

☛ Kiujn fakulojn oni invitis al tiu preparakunsido?

Ĉeestis multaj tre konataj eŭropaj lingvistoj, ekzemple David Crystal por Britio, prof. Ammon por Germanio, Robert Phillipson, aŭtoro de pluraj tre famaj libroj pri lingva imperismo. Por Italio kun la prezidanto de la itala akademio cetere ankaŭ ĉeestis du aŭ tri aliaj lingvistoj. Kaj multaj reprezentantoj de asocioj ekzemple por la defendo de la franca lingvo.

☛ Ĉu vi estis invitita kiel prezidanto de Universala Esperanto-Asocio?

Ne precize. Mi estis invitita kiel italo, sed laŭ tio kion ili (la organizantoj de la Eŭropa Komisiono, rim. de la red.) diris dum la unua vespero, tio estas, ke ili studis la vivon de ĉiu invitito, praktike ili scias ke mi estas esperantisto kaj malgraŭ tio tamen (rideto) invitis min. Ĉefe por aŭdi opinionon kaj ĉar mi okupiĝas pri 'savo' de la itala en ĉi tiu kunteksto.

☛ Kiuj efektive estis la invitintoj? Ĉu oficiale la Eŭropa Komisiono aŭ unuopaj oficejoj?

Ne, estis la Eŭropa Komisiono. Por esti pli preciza: estis la Ĝenerala Sekretario de la Eŭropa Komisiono, David O'Sullivan, kiu subskribis la inviton. La direktoro en la komisiona direkto pri dungado kaj socia aferoj, s-ro Jérôme Vignon, kiu evidente kunlaboris kun aliaj, interalie kun s-ino Sylvia Vlaeminck, kiu estras la unuon 'lingvopolitiko' en la direkto edukado kaj kulturo de la Eŭropa Komisiono, estis la praktika organizanto kaj lerta, plurlingva gvidanto de la debato. Kaj krome estis reprezentitaj tre forte ĉiuj tradukaj servoj: de la Eŭropa Parlamento kaj de la Komisiono.

☛ Ĉu vi povas rakonti pri la evoluo de la dutaga kunsido?

La ĉefa ideo de parto de la EU-oficejoj, nedirita sed komprenata de mi, estis: Ĉu oni rajtas uzi iun 'lingua franca'? Nome iun interlingvon. Sed per tio ili fakte subkomprenis la anglan. Antaŭ ĉi tiu demando preskaŭ ĉiuj ĉeestantaj fakuloj, kiuj estis ĉirkaŭ kvardeko, respondis ke ne. Do, ke oni devas uzi ĉiujn lingvojn kaj ke nia tasko ne estas defendi la anglan kaj helpi ĝin. Sed eventuale defendi la slovakajn kaj trovi interpretistojn por malgrandaj lingvoj. Estis nur unu aŭ du voĉoj ĉefe de angloj, interalie unu reprezentanto de la Brita

Kultura Konsilio (British Council), kiuj iel parolis favore al la angla lingvo kaj al la tutmondiĝo. Mi mem havis iom da tempo por respondi ĉefe al la demando: Ĉu lingvo estas nepre ligita al kulturo? Alivorte: ĉu oni ne povas uzi lingvon nur por komuniki kaj forgesi pri la kulturo? Aŭ eĉ pli alivorte: kial ĉi tiuj francoj kaj ĉiuj aliaj ofendiĝas, se oni uzas la anglan nur por komuniki? Sed lingvo kompreneble ne situas en kultur-malplena spaco, sed ĉiam ligiĝas al kulturo.

Estis belgo, profesoro pri sociolingvistiko kaj pri ekonomia lingvistiko, kiu havis amason da statistikoj pri tio, ke se oni uzas la anglan, la francan kaj la germanan, oni lasus ekster la bildo nur 18 procentojn de la eŭropanoj. Sed ĉiuj fakuloj reagis kun granda hororo je tiu speco de ekonomia rezonado. Li kvazaŭ draste formulis, ke slovakoj estas 3% de la

loĝantaro de Eŭropo. For la slovakoj! Ne gravas! Tia sinteno estis tute marĝena. Kontraŭe estis la ĝenerala konkludo: Multlingveco estas io pozitiva kaj io kion oni devas pluteni en Eŭropo.

☛ Vi diris, ke vi ne estis speciale invitita kiel prezidanto de UEA, sed kiel itala lingvisto. Ĉu la temo *Esperanto* estis iel praktika aŭ menciita dum la kunsido?

Ĝi ne estis traktita en la pleno, ĉar ĝuste en la pleno la ĉefa linio estis kontraŭ interlingvoj. Kompreneble estis kontraŭ la angla. Sed Esperanto estis abunde traktita en pli malgrandaj diskutgrupoj, ĉar inter la ĉeestantaj lingvistoj estis multaj amikoj de Esperanto aŭ konantoj de Esperanto. Prof. Phillipson mem estas tre interesata por ekscii kiam oni aperigos lian lastan libron en Esperanto kaj konfesis ke li komencas legi en Esperanto. Estis prof. Ammon ekzemple kiu ĉeestis la Nitobe-simpozion en kadre de la Universala



Anoj de la brusela Esperanto-Grupodum la prelego de Renato Corsetti.

Fotoj: Claude Gladly



Renato Corsetti (meze) kaptis la okazon por renkonti lokajn esperantistojn en Bruselo. Maldekstre: Michael Cwik, dekstre: Angelos Tsirimokos.

Informoj el Bruselo

La Komunikad-Centro de Eŭropa Esperanto-Unio en Bruselo, subtenata de UEA, informas pri la lingva situacio en la mondo kaj la batalo de esperantistoj kontraŭ lingva diskriminacio.

Tago de la Gepatra Lingvo

Fine de februaro okazis la 3-a Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, organizita de Unesko kune kun la usona firmao *Discovery Communications, Inc.*

Unesko informis, en la angla, pri diversaj minacataj lingvoj al 100 milionoj da homoj. La celo estis montri la valoron de la lingva diverseco en la mondo. Lingvoj estas ĉe la koro de la netuŝebla homara heredaĵo. Ili naskiĝas, evoluas kaj, foje, ili estas kondamnitaj

de Mahatma Gandhi el 1920: *Efektiva edukado estas neebla per fremda lingvo. Nur la popola lingvo povas instigi originalecon de penso en la plej larĝa nombro de homoj.* En la verko *Hind Swaraj*, Gandhi estis ankoraŭ pli klara: *Doni al milionoj da homoj la konon (nur) de la angla estas sklavigi ilin.*



La UEA-deklaro notas ke Esperanto ne havas la celon forigi la aliajn lingvojn, sed ke morto de lingvoj ofte estas la sekvo de la uzo de lingvoj de nacioj pli fortaj en internaciaj rilatoj. Ni volas, ke ĉiu infano havu la homan rajton esti edukata en sia gepatra lingvo. Ni volas ke la art. 2 de la Deklaracio pri Homaj Rajtoj, kiu malpermesas diskriminaciojn

substrekas, surbaze de la Unesko-dokumento 16/C de 1970, ke la gepatra lingvo signas por la homa estaĵo la esencan vojon, danke al kiu ĝi eniras sian socion, igas sia la kulturon de la grupo, al kiu ĝi apartenas, kaj metas la bazon por la evoluo de siaj intelektaj kapabloj. Marko Naoki Lins atentigas pri la vortoj

surbaze de lingvo, estu aplikata je ĉiuj niveloj. En tiu senco la E-movado festis kune kun Unesko la Internacian Tagon de la Gepatra Lingvo. Esperable tio helpas almenaŭ kelkajn el la 6000 lingvoj en la mondo travivi ĉi tiun jarcenton. Laŭ spertuloj, duono de la lingvoj estas kondamnitaj je morto.

Plua dungito en BKC

La Brusela Komunikadcentro, kiu celas kontribui al la politika kaj amas-komunikila dimensio de la E-agado sur pluraj kampoj de la Strategia Laborplano de UEA, havas pluan dungiton.



La centro sekvas kaj analizas lingvopolitikajn decidojn, tutmonde agante kun aliaj naciaj kaj internaciaj E-organizoj. Pere de la agado pri kaj por lingva egaleco kaj diverseco ĉe internaciaj kaj naciaj organizoj, politikistoj kaj ĵurnalistoj, la centro celas plibonigi kaj la publikan bildon de Esperanto, kaj la lingvan konscion. Ĝi plie celas konkrete konsili E-asociojn pri la aliro al amas-komunikiloj kaj la diskonigo de Esperanto.

Por plibonigi tiujn servojn, ekde 2003 laboras en BKC krom Dafydd ap Fergus ankaŭ Marko Naoki Lins, 29-jaraĝa esperantisto el Germanio, loĝanta ekde 2001 en Bruselo. Li krome estas komitatano de UEA kaj estrarano de TEJO. BKC tiamaniere plibonigos la ĝeneralajn operaciojn de la centro, intensigos la kontaktojn kun politikistoj kaj ĵurnalistoj, realigos pli da gazetaraĵoj komunikaĵoj kaj artikoloj, pliprofesiigos la TTT-ejon de Eŭropa Esperanto-Unio kaj pliprofundigos la rilatojn kun la triangulo UEA, EEU kaj la landaj asocioj.

La kontraktado de la novdungito eblis dank' al malavara mondonaco de japana samideano. Tio bone montras la tutmondan signifon de BKC.

Dafydd ap Fergus

☛ Kongreso en Berlino 1999 kaj scias pri Esperanto. Ĉeestis aliaj oficistoj el la eŭropaj institucioj kiuj havas regulan kontakton kun la Brusela Komunikadcentro. Do, pluraj kiuj komencas kompreni ke esperantistoj fakte eniras la bildon, ke Esperanto ne estas iu strangaĵo, sed ke la homoj, kiuj ekokupiĝas pri lingvaj rajtoj, estas esperantistoj.

☛ Resume oni povas diri ke estis forta pledo por lingva diverseco. Ĉu oni havas iun oficialan konkludon de la kunsido kaj kiuj estas nun la venontaj paŝoj? Vi menciis la simpozion kiu okazu en majo 2003.

La problemoj estas ke fronte al ĉi tiu ĝenerala opinio ke multlingveco estas io bona kaj ke oni preferu ne diskuti pri reduktado de lingvoj en la Eŭropa Unio, la prezidanto de la kunveno, s-ro Vignon, saĝe konkludis ke eble estas pli bone profundigi la temaron kaj labori en malgrandaj grupoj dum la venontaj monatoj kaj kunveni denove ĉiujn estrojn de la tradukaj servoj. Tio estas lasence stranga, ĉar la homoj de la tradukaj servoj ŝajnis la malplej ĝenataj de la multeco de lingvoj. Estas aliaj oficejoj aŭ individuoj en la institucioj kiuj volas ĉiokaze puŝi la anglan kaj kiuj diras, ke ne, ne eblas

kun pli ol dudek lingvoj en EU. Ili ankaŭ tre malvarme reagas al la proponoj ke la EU-oficejoj skribe klarigu la principojn, kiujn ĝi sekvas en ĉi tiu kampo. Inter ili tre verŝajne ne estas s-ro Vignon kaj la ceteraj organizantoj de ĉi tiu unua kunveno, nek la reprezentantoj de la Eŭropa Parlamento kiuj diras, ke ĉiuj scias ke ĉiu parlamentano devas rajti paroli en sia gepatra lingvo kaj ke oni ankaŭ sekve tiel praktikas sen grandaj problemoj.

☛ Ŝajne la taktiko de la Komisiono nun estas iom malrapide trakti la tutan demandon. Kiajn ŝancojn vi nun vidas kiel UEA-representanto aktive enmiksiĝi en la afero.

Ni devas simple pli kaj plu informi la homojn kaj daŭrigi la laboron de la Brusela Komunikadcentro pri ekzemple la temo de lingva diskriminacio, ĉar mi havas la impreson, ke la ĝenerala opinio pri Esperanto komencas fariĝi favora. Antaŭ tri jaroj mi estus dirinta ke se ni devus elekti lingvon nenuntempan, oni elektus la latinan, ĉar la latina havas grandan prestiĝon, sed nun mi komencas diri, ke eble ankaŭ Esperanto komencas esti konsiderata.

Intervjuis: Marko Naoki Lins

Esperanto en la 3-a Monda Socia Forumo



fotoj: Jozefo Paŝeko

Nature en tiu ĉi alimondista movado, kiu fakte estas eksterordinare bunta kaj multifaceta movado de movadoj, nia strebo por mondskala lingva demokratio havas plenigutan lokon kun granda potencialo. La gravan respondecon videbligi nian proponatan solvon alprenis plejparte la negranda sed entuziasma aro da lokaj gaudaj esperantistoj, inter kiuj troviĝis ankaŭ UEA-delegitoj antaŭ la Forumo. Tute mankis subteno kaj partopreno flanke de la landa asocio BEL. Alvenis ankaŭ po unu francino, argentinano, rio-de-janejrano kaj ĉiliano.

Je la malferma amasa marŝado proksimume kvardeko el ni iris kune portante rubandojn, flagojn kaj specialajn identigajn verdajn surĉemizojn, kaj jam unu el la plej fruaj atingaj estis la apero de E-flago en foto de la marŝado, aperinta kovrile sur la plurmilondona brazila ĵurnalo *O Globo*. Dum la marŝado oni disdonis

broŝurojn donacitajn de loka esperantisto al la spektantoj kaj aliaj marŝantoj kaj klopodis klarigi (diverslingve laŭ la alparolato) kio estas Esperanto, ktp. Simile sed stare okazis dum ĉiuj ceteraj tagoj de la Forumo en ties plej gravaj ejoj (la stadiono Gigantinho kaj la Katolika Universitato), danke al grupo da nelaciĝemaj fideluloj. Kelkaj membroj de la grupo estis intervjuataj de diversaj amaskomunikiloj dum tiuj tagoj.

Ni okazigis nome de UEA tri proprajn sesiojn listigitajn en la programo de la Forumo, kun prelegoj pri Esperanto kiel en la portugala sub la gvido de César Domeles (Ĵimes Vasco Milanez, José A. Pacheco, Marcelo Stodutto kaj Miguel Boeira Vianna), tiel en la angla (Paulo Izaias Ereno). La tria sesio temis pri la lingvaj homaj rajtoj kaj la indiĝenlingva genocido (J.A.Vergara), rilate kion oni substreki kontrastige la E-movadan favoran sintenon al lingva ekologio. Ĉe la samtempa porinfana Forumeto tri

De la 23-a ĝis la 28-a de januaro okazis en Porto Alegre (Brazilo) la 3-a Monda Socia Forumo, la plej grava kunveno de la tutmonda civila socio. Sub la slogano *Alia mondo estas ebla*, kiu legeblis ankaŭ en Esperanto sur la tiea plej populara T-ĉemizo, 100 000 alvenintoj de pluraj mondpartoj, landoj kaj regionoj interkonatiĝis, manifestaciis surstrate, interŝanĝis spertojn, ĝuis artaĵojn, sed precipe pridiskutis kadre de pli ol 1 700 plej diversemaj kunsidoj kritikojn kaj alternativojn al la maljusta kaj detruiva monda ordo kiun daŭre kreas la mondonmerkatiga procezo, serĉante tutmondiĝon de la homaj rajtoj, demokratio kaj egaleco.

lokal esperantistinoj (Maria da Glória Teixeira Geyer, Maria Elisabeth Gomes Diehl kaj Nilce Maria Rodrigues) organizis sukcesan E-arangon kun dancado, kantado kaj ŝkeĉo.

Mi partoprenis kiel publikano en speciala prelegsesio pri la temo *Kiel garantii la kulturen kaj lingvan diversecon?*

Estas interese noti ke malgraŭ la kundividita maltrankviliĝo pri la lingvobora kaj kulturhomogeniga efiko de la regantaj potencoj, la sola ideo pri ia kontraŭstara rolo de Esperanto ĉi-kampe ankoraŭ trovas antaŭjuĝojn kaj miskomprenojn, ĉi-foje flanke de la gvidanto de tiu diskutabla Luciana Castellina, prezidanto de kulturassocio ARCI, Italio. Ŝi tamen promesis pridiskuti la eblon okazigi oficialan Foruman sesion pri Esperanto kadre de la venonta MSF, responde al mia propono.

Tial ke eble ni neniam trovos publikon pli kompreneman al nia ideo



nek tiom amase kunvenintan ol tiu Forumo, oni devas plani nian partoprenon en similaj okazintaĵoj: laŭ mia opinio ni bezonas pli da politik-konsciaj esperantistoj tie, pli da profesinivelaj informiloj, ne tiom da ne tre taŭgaj verdaj steloj, sed pli da jubileaj E-simboloj, pli da disdoneblaj kopioj de la Manifesto de Prago en kiel eble plej diversaj etnolingvoj pro ties kohereco kun la fundaj ideoj de la MSF, ktp.

La venontaj Sociaj Forumoj estos jen Mondaj (Hajderabado, Barato, 2003, kaj ree en Porto Alegre, 2005), jen regionaj (ekz. Eŭropa, novembro 2004). Ni fosi nian E-sulkon kunflue kun ĉiuj kiuj volas konstrui novan mondon.

José Antonio Vergara (Ĉilio)



Forpasis Lou Harrison (1917-2003)

Lou Harrison, la bone konata usona komponisto, kiu forpasis la 2-an de februaro por koratako je la aĝo de 85, plenigis sian landon per sia muziko dum pli ol duono de jarcento. Sed li estis pli ol komponisto – Lou estis simbolo de la vera internacia artisto.

Por ni en Esperantio, Lou Harrison famas pro sia subteno kaj uzo de nia kara lingvo. Li estis la unua usona komponisto kiu uzis titolojn en Esperanto, ekz. *Konĉerto por Violono kaj Perkuta Orkestro*, kaj estis eble la plej fama membro de la Esperanto-Ligo por Nordameriko. Dum mia skribado de ĉi tiuj pensoj, mi aŭskultas *La Koro-Sutro'n*, lian ĉefan verkon uzantan Esperanton. Jen lia amo por beleco, de la tradicioj de fremdaj kulturoj, de

simplaj plezuroj, de muzika spico pere de ekzotikaj perkutinstrumentoj (ĉefe la game-lano – la povplena muzikilaro de Indonezio) kaj nekutimaj harmonioj. Jen la ŝato de Esperanto kiel ponto inter kulturoj, inter komponisto kaj lia aŭdantaro.

Lou Harrison naskiĝis en 1917, en la usona ŝtato Oregono. Krom kelkaj jaroj en la 1940-aj, li pasis sian vivon en Kalifornio, kaj oni konis lin kiel komponiston de la okcidenta marbordo (li apartigis la stilon de la pli severa, akademia stilo de Novjorko kaj la orienta marbordo). Li dronis en la muzikoj de Azio – Ĉinio, Japanio, Korejo, Indonezio – kaj ankaŭ de Meksiko kaj de la amerikaj indianoj. Oni nomis lin (ĝenerale mokeme) antaŭulo de la t.n. novaĝa muziko, sed li interesiĝis nur pri la esplorado de sia propra muzika vojo, la vojo de unuopulo. Li ankaŭ subtenis

la usonan avangardon, kaj amikiĝis kun la elstaraj progresemaj komponistoj en Usono dum la jaroj post la dua mondmilito: John Cage, Edgard Varese, Carl Ruggles, kaj Alan Hovhanness. Kun du el la plej elstaraj komponistoj de tiuj jaroj Henry Cowell kaj Arnold Schoenberg li studis kaj kreskigis siajn proprajn eblojn kiel komponisto. Multaj rigardas al Lou kiel la *baptopatro* de la minimumismo en Usono, pro la ĉarma simpleco kaj dolceco de lia muziko.

Lou estis persono ŝatata de ĉiuj, eĉ tiuj, al kiuj ne plaĉas lia muziko. Li famis tra la mondo pri sia feliĉa spirito kaj gastigemo kaj mem volis esti memora kiel *maljuna viro, kiu multe amuziĝis*. Sed lia kontribuado al la usona kulturo en la 20-a jarcento – kaj lia kontribuado al la scio kaj akceptado de Esperanto en Usono – estas unika, profunda, kaj daŭra.

Kiel komponisto, mi mem ĉiam lernas ion per aŭskultado al lia muziko. Lou Harrison daŭros kiel inspiro al komponistoj, kiuj vere interesiĝas pri la konstruado de pontoj, kaj lingve kaj muzike, kaj Esperante kaj belsone.

David Gaines (Usono)

*Por legi pli pri Lou Harrison (angla-lingve), eblas viziti lian oficialan arĥivon ĉe: http://www.sjsu.edu/depts/music_dance/centers/harrison_archive

Demisia etoso ĉe TEJO

Vi elektis min kiel estraron de TEJO dum la Internacia Junulara Kongreso en Strasburgo. Do mi ŝuldas al vi klarigon kial mi nun decidis forlasi la estraron, komencis la demisia anonco de Hokan Lundberg. La kialo estas ke mi laciĝis je la sinteno de UEA al TEJO.

Hokan estis inter la plej aktivaj anoj de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo kaj organizanto de pluraj sukcesaj TEJO-seminarioj. Li ankaŭ estas la ĉefa motoro malantaŭ diversaj projektoj kiel www.lemu.net, www.lingvo.info kaj www.tejo.org.

Ekde jaroj TEJO petas UEA-n por plentempa oficejo, kiu povos okupiĝi pri subvencifontoj kaj administra laboro ĉe TEJO. Nekontenta pri duontempa oficejo, Lundberg volis montri sian malkontenton. Fontoj ĉe UEA substrekas la mankantajn financajn rimedojn: Ni tutsimple ne havas la monon.

Multaj versajne memoras, ke tiu ĉi temo jam delonge estas en la tagordo, sed ja temas pri afero, kiun ni bedaŭrinde ne mem simple povas decidi, kaj flanke de UEA oni ne tiom rapide moviĝas, kiom ni ŝatus, rimarkas Holger Boos, prezidanto de TEJO. Tamen progresoj okazas, kaj ni esperas, ke mono por TEJO-oficisto povas aperi en la UEA-buĝeto por 2004.

Alia temo kiu okupas la animon de TEJO, estas la demando pri jura – male al teknika aŭ administra – sendependiĝo de UEA, kiu donas al la junulara E-asocio grandajn avantaĝojn pri subvencipetado kaj tenado de kontaktoj kun neesperantistaj junularaj organizoj.

Diversaj internaciaj organizoj financas junularajn programojn. Por la IJK en la sveda urbo Lesjöfors, Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo kaj TEJO petis financan subtenon de Eŭropa Unio. La ideo estas, pere de mona subteno, okazigi seminarin en Svedio pri 'kulturo de toleremo'. La tre profesie farita financpeto de SEJU/TEJO estis fine de januaro sendita Bruselen por la EU-programo Junularo. Aparta intenco estas involvi malpli privilegitaĵajn junulojn el la tuta mondo en la projekton de blindaj homoj aŭ junaj esperantistoj de sociekonomie malpli forta fono. Malgraŭ la demisio, Hokan Lundberg, unu el la ĉefaj organizantoj, antaŭĝojas: Mi estas optimisma, ke nia subvencipeto sukcesos. Nur per ekstera monfonto eblas starigi defian programon. Mi esperas, ke ankaŭ aliaj E-organizoj ankaŭ provos subvencipetojn al diversaj programoj.

La demisio de Lundberg okazis samtempe kun bona novaĵo de junuloj

el Ĉeboksary en la Ĉuvaŝa Respubliko (Rusio). Komence de februaro ekfunkciis la oficejo de junulara E-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko kun salajrata oficistino (Saŝa Fedotova), komputilo, k.t.p. La akiro de la oficejo iĝis ebla dank' al multjara sperto pri kontinua organizita laboro, kies ĉefa frukto estas ĉiujaraj Lingvaj Festivaloj, kaj certa lerteco pri akirado de subvencioj – respubliko, naciskale kaj internacie,

Marko Naoki Lins

65-jara infano preta por pensiigi!

TEJO naskiĝis en 1938 en Nederlando. Tiam ĝi estis baptita sub la nomo Tutmonda Junular-Organizo. 14-jaraĝa TJO transprenis en 1952 per laŭleĝa nomŝanĝo la aktualan nomon TEJO. Post longa batalado TEJO finfine kun sia 18-jariĝo kaj plenkreskiĝo estis rekonita de gepatra UEA kiel samdevena – eĉ sen la devo pruvi la samsangecon!

La biografio de TEJO estas historio de sukcesoj kaj malsukcesoj. La intergeneracia rilato inter la infana TEJO kaj la gepatra UEA neniam estis sen konfliktoj. Daŭra strebo al aŭtonomio ĉe unu flanko, daŭra kontrolemo kaj plendo pri neserioza konduto ĉe la alia flanko.

Ni imagu fikcian interparolon en ajna roterdama domo inter UEA kaj TEJO:

UEA: 65-jaraĝa vi nun fariĝis kaj vi daŭre loĝas ĉe la gepatroj!

TEJO: Mi almenaŭ pagas ĉiumonate luan al vi.

UEA: Ĉu vi ne iom hontas ke vi malgraŭ pensiigo daŭre ne atingis multon?

TEJO: Nu, mi ĉiam provis, sed post iom da tempo vi ja ĉiam elsuĉis miajn plej kapablajn fortojn.

UEA tusante: 65 kaj daŭre nutrata de viaj gepatroj!

TEJO: Dum mia tuta vivo mi devis almozpeti por sufiĉa nutrado. Estus multe pli ruze starigi iun nutraĵplanon por ke la infano kresku. Sed ne, dum jardekoj mi ricevis tro multe por morti, sed tro mal-multe por prosperi.

UEA: Kial ni ankoraŭ donu pli da mono al vi? Vi ofte finance

klarigas la UEA-estrano Andrej Grigorjevskij. La oficejo miascie estas la sola en la mondo memstara junulara E-oficejo. Krom la oficistino tie regule kunvenas ankaŭ ĉeboksaraj E-aktivuloj por prizorgi agadojn de la Asocio.

Marko Naoki Lins

fiaskis kaj ni devis poste ordigi la financojn.

TEJO: Sed nun kun 65 mi havas pro la kolektitaj spertoj longperspektivan, seriozan planon por propra mastrumado kaj esperas ke vi helpas al mi.

UEA: Tion vi jam ofte diris kaj je la fino viaj entreprenoj fiaskis.

TEJO: Mi bezonis longan tempon efektive por trovi bonan planon por mia vivo.

UEA: Kial viaj gepatroj ĝuste nun kredu vin?

TEJO: Estas demando de fido. Fidu min, ke mi atingis aĝon en kiu mi devas decidi kio estas la plej bona por mi.

UEA: Nu, eble estas bona ideo, helpi vin per startkapitalo por realigi viajn revojn. Finfine: Ĝoja infano, ĝojaj gepatroj.

TEJO kun emocio: Dankon, gepatroj. Vi ne pentos. Mi pensas ke per mia helpo mi povos prosperigi miajn ideojn kaj je la fino ne plu dependi de vi.

UEA: Espereble, sed ni fidas vin. Kiu finfine volas havi 65-jaraĝan infanon dependa de 95-jaraĝaj gepatroj? Tia situacio estas malsana!

Teĉjo Ueanjo

Kalendaro 2003



Malgraŭ kontrolo kaj komparo kun aliaj kalendaroj ne eblas garantii la fidindecon de ĉiuj informoj en la kalendaro, pri kiuj respondecas nur la organizantoj. La venonta kalendaro aperos en la julia numero.

marto

05-09: EoLA-15 (Esperanto: Arta Festivalo), Novosibirsk. ☑ Katerina Arbekova, a. k. 107, RU-630078 Novosibirsk-78, Rusio. ☎ +7-3832-468494 ☐ katka@drbit.ru

07-09: Seminario pri instruado kaj metodiko en Frankfurt ĉe Majno. ☑ Peter Hauser, ☐ ercmontara.ec@t-online.de

07-09: Seminario pri E-Literaturo. ☑ Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. ☎ +31-70-3556677, ☐ +31-70-3584422. ☐ iei001@tiscali.nl

08: Jarrenkontiĝo/Konferenco de OSES, Slovakio. ☑ Okcidentoslovakia Esperanto-Societo, Nataša Šandorová, Záhrebská 4, SK-811 05 Bratislava, Slovakio. ☎ +421-02-52494587, ☐ nasta@nextra.sk

14-16: E-Semajfino por komencantoj ĉe Mannheimer Abendakademie. ☑ Ulrich Matthias, ☐ Ulrich.Matthias@t-online.de

14-21: Nacia Kongreso de FFEA (Franca Fervoja Esperanto-Asocio) en Collonges-la-Rouge. ☑ Sylviane Lafargue, 8 bis Av Anatole France, FR-94600 Choisy-le-Roi, Francio. ☎ +331-48-530552 aŭ +332-43-211639

15-16: 3-a Kunloĝo en Nordorienta Ĉinio. Temo: Uzu Esperanton por la 89-a UK 2004 en Pekino kaj la 5-a ĈK, Harbino, Ĉinio. Kunloĝejo Heilongjiang Kejixueyuan Songshanziaoxu (Harbin Nangangu Songshanlu 111 hao), CN-150090, Ĉinio. ☑ S-ino Song Ping, ☎ +86-(0)451-2313850; Mov☎: +86-1383 6113 850, ☐ song_paco@hotmail.com

22: Printempa E-Balo en Sofio. ☑ Lasto Nikov, p. k. 497, BG-1000 Sofio, Bulgario. ☎ +359-2-9835084. ☐ lasto@mail.bg

22-23: Vintraj tagoj en Lahti, Lahden Kansanopisto, Finnlando. ☑ EAF, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. ☐ eaf@esperanto.fi

22-24: Balkana renkontiĝo – seminario de malgrandaj kaj mezaj produktistoj, komercistoj kaj gastoj. ☑ Lasto Nikov (v. 22. okt).

30 mar - 01 apr: Aprilaj ridetoj. Odeseo, Ukrainio. ☑ Tatjana Auderskaja, ul.Korolenko, 5b-26, UA-65100 Odeseo-100, Ukrainio. ☐ zoo@te.net.ua

aprilo

10-24: Bicikla karavano de BEMI en Rusio: Harkiv, Slavjansk, Lugansk, Volgograd, Astrahan. ☐ boogier@rusautogaz.ru

11-13: Studadesio por baza kleriĝo kaj estontaj instruistoj en Herzberg/Harz, Germanio. ☑ Peter Žilvar, 05521/1363, ☐ zilvar@t-online.de

14-18: Inicado kaj praktiko de joko kun Arlette Plutniak kaj Katalin Kováts en Bouresse. ☑ Kvinpetalo, Esperanto-Centro, FR-86410 Bouresse, Francio. ☎/☐ +33-(0)549428074, ☐ kvinpetalo@club-internet.fr

14-21: 19-a Printempa Semajno Internacia (PSI), la paska renkontiĝo por la tuta familio, en Bonn, Germanio. ☑ Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, DE-53474 Bad Neuenahr - Ahrweiler, Germanio. ☎ +49-(0)2641-4885, ☐ +49-(0)2641-978666. ☐ psi@esperanto.de, www.esperanto.de/psi

15-25: Luoyang Peonia Festivalo en Ĉinio. ☑ Ji Feng, Guangchuanjie 3-hao Yuan, Laocheng Qu, CN-471002 Luoyang, Henan, Ĉinio; aŭ Zhang Xuesong, Changtaiguan Gongdiansuo, CN-464193 Xinyang, Henan, Ĉinio. ☐ zxe@uea.org

16-22: 27-a Internacia Junulara Festivalo en Savona, Italio. La temo: *Inter tutmondigo kaj lokismo: kia identeco por ĝejnuloj?* ☑ ijt.admin@esperanto.it

17-21: 5-a PIK – Plurnivela Internacia Kursaro (printempa sesio) en KCE, Svislando. KCE, CP 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds. ☎/☐ (41) 329267407, ☐ kce.esperanto@bluewin.ch, www.esperantio.net

18-21: Kongreso de Nov-Zelanda E-Asocio en Christchurch. ☑ Sekretario de LKK, David Dewar, ☐ gddewar@ihug.co.nz

19-21: 58-a Kongreso de SAT-Amikaro en Cap d'Agde. ☑ SAT-Amikaro, 67 av. Gambetta, FR-75020 Paris, Francio. ☎ +33-(0)147978705, ☐ +33-(0)147977190. ☐ satesper@noos.fr

19-26: Seminario Esperanto@Interreto de TEJO en Bostono, Usono. ☐ hokan@ikso.net

25-27: Junulara E-Renkonto en Makó, suda Hungario. ☑ Hungara Esperanto-Junularo, pk. 87, HU-1675 Budapest, Hungario. ☐ hej@esperanto.hu

26: Turisma renkontiĝo en Zochova chata (Červený Kameň), Slovakio. ☑ Esperanto-MEL, p. k. B-152, SK-012 41 Žilina, Slovakio. ☎ +421-(0)903-552152 (Juraj Gondžúr), ☐ gondzur@urap.sk

26-27: Internacia Printempa Festo en Coswig-Sörnwitz apud Dresdeno, Germanio. ☑ Norbert Karbe, Dr.-Otto-Nuschke-Str. 12, DE-01796 Pirmas, ☎/☐ 03501 773232, ☐ nokosaksio@tiscali.de

26 apr - 03 maj: Semajna Verkado-Staĝo kun István Nemere kaj Anna Löwenstein, Grésillon. ☑ Chateau, FR-49150 Baugé, Francio. ☎ +33-



2-41891034. ☐ esperanto.en.vendomois@mail.dotcom.fr

29 apr - 03 maj: Problemoj lingvosciencaj kaj gramatikaj en la nova eldono de PIV kun Michel Duc Goninaz en Bouresse. ☑ Kvinpetalo (v. 14 apr).

majo

01-05: Balkana E-Simpozio, Okcidenta Universitato de Timișoara, Rumanio. ☑ Aurora Butte, C.P.351 O.P.1 1900 Timișoara, Rumanio. ☐ a_bute@hotmail.com

01-05: 7-a Meksika Nacia Kongreso de E-o en Kuernavako, temo: *Promesoj kaj defioj de nia dua jarcento*, ☑ Meksika Esperanto-Federacio, ☐ 7nke@esperantomex.org

01-11: Aroma Jalto. Muzika-kultura festivalo. ☑ Volodimir Hordijenko, p.k.35, Kijiv-133, UA-01133, Ukrainio, ☐ volodimir_h@ukr.net

08-11: Kongreso de Fédération Espérantiste du Travail en Grésillon. ☑ FET, 115 rue Béranger, FR-92320 Chatillon, Francio. ☎/☐ +33-0146426479. ☐ fetesperanto@wanadoo.fr

08-11: Stellan Engholm kaj la Malgranda Revuo (1943-1952) kun Johano Rapley en Bouresse. ☑ Kvinpetalo (v. 14 apr).

08-12: Montara semajnfino de JEFO – Junulara E-ista Franca Organizo en Montaro de Vercors, proksime al Grenoble, sud-orienta Francio. ☑ Adélaïde Charière, 4, rue Lavoisier, FR-38100 Grenoble, Francio. ☎ +33-4760 10228. ☐ charriere.adelaide@netcourrier.com

09-11: 4-a Trilanda Renkontiĝo de Germana E-Junularo en Heidelberg, Germanio. ☐ Inge Simon, Simon-Esperanto@t-online.de

10-16: 55-a IFEF – Kongreso (Internacia Fervoja E-Federacio) en Dresdeno, Germanio, kun abunda folkloro, kultura kaj turistica programo. ☑ Postfach 100425, DE-61144 Friedberg, Germanio ☎/☐ +49 60314617, ☐ 55a-IPK@web.de

15-21: Internacia Seminario de E-Turismo Xinyang, Henan. ☑ S-ro Zhang Xuesong, Changtaiguan Gongdiansuo, CN-464193 Xinyang, Henan, Ĉinio. ☎ +86-376-8821553 ☐ teofestivalo@peoplemail.com.cn

16-18: SAT en Britio: stimula semajnfino en bela kampara domo kun Gary Mickle el Germanio. ☑ Derek Tatton, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke on Trent, Staffordshire, ST129DG, Britio. ☎ 44-1782-372105, ☐ wedgwood.college@staffordshire.gov.uk

16-19: Wuhu-a Internacia Tea Foiro





Bonvenigenda ekzemplo ne tute senproblema

La Ĉevalo de Motizuki. Korusa suito kun muziknotoj (1998). Ōkawa Essei (1930-88), Miyazawa Hazime (1932). Muziko de Miki Minoru (1930). El la japana trad. Konisi Gaku. Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 1999, 95p. ISBN 4 88887 015 2. 30cm. € 12.

La Ĉevalo de Motizuki, suito por gea koruso fare de Miki Minoru, estas ekzemplo bonvenigenda de artisma esprimo, kies eroj en Esperanto estas, bedaŭrinde, ĝis nun ankoraŭ tre maloftaj. Temas pri inda kaj interesa eldono dulingva, japana-Esperanta, kiu tamen aperas ne tute senproblema.

Pri tio mi klarigos poste, unue vi ricevu impreson, pri kio temas la tuto. Sur la kovrilo kiu ial ne mencias la titolon ankaŭ en Esperanto, ni vidas la ĉevalon de Motizuki, kiu – tiel al ni diras la rakonto – naskiĝis en la sama tago kiel la princino. Por gratuli la samtagan naskiĝon de sia filino kaj la ĉevalo Tukige, Lia Moŝto degnis nomi la princinon Ikoma, Virĉevalo. La princino kaj la ĉevalo fariĝas bonegaj geamikoj. Ŝi amas rajdi sur lia dorso kaj ŝia lerteco tiukampa provokas ĝeneralan admiron. Tiu feliĉa stato daŭras ĝis ŝia famo ĝiskuras la metropolon, kie la mikado dekretas, ke ŝi fariĝu lia kromsinjorino.

Al la princino tio eĉ neniel plaĉas kaj la ĉevalo, siavice, suferas, eĉ, pro amĉagrenoj(!). Dume ŝia patro, por solvi la aferon, intencas perforte fini ĉian diskuton kaj taski al la ĉevalo ion neplenumeblian: *Aŭdu, Tukige. Kiam la sonorilo de la kastelo batos la dekan horon, vi ekkuru por trapasi ĉiujn sep vilaĝojn de Mimaki. Tri fojojn en du horoj. Sciuj, ĝuste tri fojojn. Ne forgesu! [...] Tamen, se vi plenumos la taskon, Tukige,*

mia filino estos via. Vi rajtos preni ŝin kien ajn vi volas. La ĉevalo, nemirige, brile plenumas la taskon. Tial la patro de la princino ne povas ne forlasi la vojon honestan kaj li ruze igas la ĉevalon kredi, ke ĝi alvenos tro malfrue. Tukige, ege malĝoja, sin jetas en profundadon. La patro estas kontenta, sed lia filino rezignas pri ĉio tera kaj dediĉas la ceteron de sia vivo al memorado pri la amata ĉevalo.

Kvankam estas interese gustumi erojn el aliaj kulturoj, mi sentas tamen kelkan elreviĝon. Konisi Gaku estas sperta kaj kompetenta esperantisto, sed lia cetere vigla traduko de la japana teksto ne sukcesis tuŝi min. La teksto estas konsiderinde komplika por okcidentaj oreloj kaj ne fluas tiel kiel mi dezirus en poezio; krome mi dubas, ke tian, tekste kaj muzike nefacilan verkon, oni povus ĝui en Esperanto je nivelo komparebla kun la japana originalo. Supozeble dependos parte de tio ĉu kaj kiom oni rekonas la verkon kiel ion japanan kaj kian sperton oni havas pri la japana uzado de Esperanto kiu, kiel ajn kompetenta, ekde mia esperantistiĝo en 1986 ne Cesis impresi min kiel speciala kaj "alimaniara".

Sed ĉar temas pri verko muzika, mi finas per la deziro, ke iam ni povos ĝin aŭskulti sur kompaktdisko por apreci la verkon kia la komponinto ĝin intencis.

Antonio de Ruijter



Nemalhavebla, modela verko de leksikografio

Erich-Dieter Krause (1999): Grosses Wörterbuch Esperanto-Deutsch. Hamburg: Helmut Buske Verlag. XIV +882 p. ISBN 3-87548-193-3. € 42,00.

La Granda Esperanto-Germana Vortaro kun siaj 80 000 leksikaj unuoj (kapvortoj kaj internaj esprimoj, kunmetitaj vortoj) konsistigas ne nur la plej grandan vortaron de sia speco, sed ankaŭ unu el la plej grandaj Esperanto-vortaroj. Laŭ la nombro de unuoj ĝi eĉ superas la Novan Plenan Ilustritan Vortaron (PIV: 46 890), sed ne laŭ amplekso (komparebla kun la itala, franca, hungara kaj ĉina vortaroj). Ĝi estas konsiderinde pli granda ol la alidirekta Germana-Esperanto-vortaro de la sama aŭtoro el 1983.

De kie tiom da vortoj kaj esprimoj? Nek amaso da homoj kunlaboris, kiel kaze de PIV, nek granda korpuso disponiĝis. La aŭtoro mem kolektis dum 30 jaroj la novajn vortojn kaj diversajn esprimojn el gazetoj kaj libroj. Jam de longe sentiĝas la bezono por reprezenta Esperanta korpuso simila al tiu de aliaj naturaj lingvoj, surbaze de kiu eblus ĉerpi informojn pri la lingvouzo (pri vortoj, vortkombinoj, rekcioj) kaj tiel eblus doni al la leksikografoj firman bazon! Alie restas nur la persista kaj konscienca laboro kaj lerteco de la leksikografo. Krause kiel vera

leksikografo (profesia, li profesoras en Lepzigo kaj membras en AdE) observas la lingvouzon, registras ĝin kaj post racia selekto proponas la vortojn. Laŭ li eĉ la ekstereŭropa uzo estas adekvate konsiderata. Li ne volas preskribi, doni devigajn normojn. Cetere tion neniu E-vortaro arogas al si.

Krause traktas Esperanton kiel aliajn lingvojn, kaj tute prave, ja malgraŭ tio ke ĝi naskiĝis en provtubo, ĝi evoluas nature. La ĝisdata vortprovizo de la vortaro rilatas al la ĉiutaga lingvo kaj al diversaj fakaj terenoj. La fakaj etiketoj estas eĉ pli detalaj ol en PIV. La botanikaj, zoologiaj kaj medicinaj terminoj aperas plej ofte kun siaj latinaj nomoj. Ni retrovas necesajn vortojn kiel *kompakta disko*, *hamburgero*, *picejo* kaj ankaŭ por la nuntempa komputado kiel interreto, retmesaĝo, retumi, ktp. Krause akceptas komputoron kiel terminon kaj etikedas komputilon kiel ĉiutagan vorton (PIV registras nur komputilon), kvankam la signifo de *komputi* jam entenas tiun agadon, kiun komputilo faras. Aparte envortariĝis *kompti* en la senco de teknika mezurado (ĝi ne aperas en PIV). Kelkajn mankojn oni

kompreneble povas trovi, ja unu homo ne kapablas ĉion regi (ekz. mankas la matematika signifo de la morfemo aro: *Menge*). Ankaŭ enkonduko forgesiĝis kaj vane mi serĉis la trinkajon *kolao*, troviĝas nur *kokakolao*.

La aŭtoro uzas ankaŭ diversajn stiltavolojn (kiel *Serce*, *insulto*), ofte ni trovas la etiketon *kununlingve* (umg), ekz. ĉe foto por distingi ĝin de fotografio. Sed mankas *arkaike*, kiun meritus kelkaj niaj vortoj, ekz. *bankiero*. Post 100 jaroj da historio oni ne plu povas ignori la lingvoevoluo, envenon kaj malaperon de vortoj. Utila estas la referenco al sinonimoj (ekz. ĉe *instrui* vd. *eduki*, *lernigi*, *klarigi*) kaj la prezento de diversaj variantoj (*buĝeto*/*budgeto*, *Budho*/*Buddo*/*Budao*), sed mankas *ginzo*, estas nur ĝinso (PIV registras ambaŭ). Ĉe naciaj karakterizaĵoj kelkfoje estas referenco.

Temas pri enciklopedia verko laŭ la modelo de PIV: ni povas trovi en ĝi proprajn nomojn de famaj personoj kaj geografiajn nomojn en esperantigita formo kun klarigo germanlingva. El la personaj nomoj ŝajne nur la viraj aperas. Strange! Ankaŭ Esperantaj akronimoj envortariĝis, kiel PIV, PAG, IJK kaj E-organizaĵoj. Laŭ la tradicio de E-vortaroj, la derivitaj kaj kunmetitaj vortoj aperas en la vortnesto de la radiko: unue la sufiksaj vortoj kaj kunmetaĵoj



kun aldonita radiko, poste la prefiksaj vortoj kaj kunmetaĵoj kun antaŭmetita radiko. Tiu vicordo iom diferencas de tiu en PIV, kie la afiksaj vortoj antaŭas la kunmetitajn. Ĉio estas en strikta alfabeto ordo, tiel *lerneja* antaŭas *lernejon*. Post la vortoj ni trovas karakterizajn kaj utilajn esprimojn: en la vortnesto de

lerni troviĝas *lernejo* kaj post ĝi *elementa lernejo*, *komerca lernejo*, *frekventi lernejon*, *regularo de lernejo*. Aperas pli da kunmetaĵoj ol en PIV kaj inter ili pluraj fakvortoj. Sed mankas ekz. *lernaĵo*, *mallerni* kaj *lernema*, la unuaj du motivite, ja mankas ekvivalento en la germana, sed la dua sinonimas kun *diligenta*, tiel estus *fleißig* germane. Afiksoj aperas en memstaraj vortartikoloj.

La strukturado de la vortartikoloj estas klara, bone travidebla. La diversaj etiketoj helpas en la distingo de la signifoj. Jam la nova germana ortografio estas aplikata. Avantaĝo, ke li atentis ankaŭ la aŭstran kaj svisan lingvouzojn, kaj aldonas la genron al la germanaj vortoj, tiel helpas la uzon por negermanlingvanoj.

La Granda Esperanto-Germana Vortaro estas modela verko de leksikografio, ĝi nemalhaveblas por ĉiuj germanaj esperantistoj kaj por ĉiuj esperantistoj kiuj scias aŭ lernas la germanan.

Ilona Koutny

Obsediĝo pro detalo: skui la kapon en bedaŭro

Tri pri la Tri. Tri raportoj pri la tria alfabeto. André Albault kaj Jean Doublet. Toulouse, 2001: eldonis la aŭtoroj.

Foje okazas, ke eminenta maljuna esperantisto obsediĝas pro detalo de nia lingvo, tiom ke tiuj, kiuj antaŭe respektis lin, povas nur skui la kapon en bedaŭro. Jen eksprezidanto de la Akademio de Esperanto volas konvinki nin, skribi y anstataŭ j.

Laŭ Albault kaj Doublet, vi konas jam du alfabetojn de Esperanto: la ordinaran, kaj tiun Fundamentan surogaton en kiu oni skribas ch, gh ktp anstataŭ la supersignitaj literoj. Ili volas rekomendi ankaŭ "trian alfabeton", la Novan Help-Alfabeton (NHA), en kiu *c ĥ ĵ s ŭ* fariĝas *ch ĝ kh zh sh u* kaj la fundamenta *j* fariĝas *y*.

Ĉi tiu broŝuro konsistas el tri raportoj, du al la Akademio de Esperanto kaj unu "preter la Akademio al la inteligentaj", plus aliaj dokumentoj diversoriginaj kaj diversdataj. Ĝi donas la impreson esti kunjetita sen redaktado: abundas malglataĵoj, kaj nenie oni trovas unufrazan koncizigon de tio, kion la aŭtoroj rekomendas (kian mi metis ĉi-supre). La aŭtoroj pretendas, ke *NHA komencas esti uzata en internet.... Ĉu vere?*



Per Google mi serĉis en la Tut-Tera Teksaĵo la vortojn *lingvoj* kaj *lingvoy*. Mi trovis:

lingvoj (= trad. ortografio) – 28600 dokumentojn
lingvoy (= NHA) – 12 dokumentojn

Jam ĉiu nova Windows-komputilo (almenaŭ en Eŭropo) estas ekipita per unikodaj tipoj, en kiuj troviĝas niaj supersignitaj literoj. Milionoj da komputiluzantoj do disponas pri la supersignitaj literoj de la ĉeĥa, la pola, la hungara, la latva, kaj ... Esperanto. Tiu malmulte konata iniciato de Microsoft okazis ne pro premo de esperantistoj, sed pro la komerca neceso internaciigi la komput-programojn, por ke oni povu libere kombini diversajn lingvojn en la sama dokumento, en la sama tipo. Flankefike, profitis Esperanto kaj malaperis la ĉefa argumento por NHA.

En la interreto NHA restas praktike neuzata. Oni aplikas aliajn provizorajn solvojn (ΛC, CΛ, CΛ) aŭ – ĉiam pli ofte – Unikodon, kiu ebligas al la esperantistoj resti ĉe sia tradicia ortografio, kiel ili prave preferas.

John Wells

Estas ja nekutime ke aŭtoro komentariu recenzon pri propra libro, tamen nepras iuj aldonaj vortoj al la recenzo de M. van Oostendorp pri *Eseoj memore al Ivo Lapenna*, aperinta en la revuo dec. 2002. La recenzanto diras: *Preskaŭ malestas la kritikantoj kaj mallaudantoj... la Eseoj estas tro pozitivaj por samtempe esti fidindaj. Oni aŭskultas nur la amikojn...* Kiel redaktoro de la verko mi devas aldoni, ke, ĝuste por garanti aliron ne nur unuflankan, estis invititaj al kontribuado ankaŭ personoj, kies rilatoj al Lapenna estis konataj kiel draste malpozitivaj; inter ili nunaj aŭ eksaj estranoj de UEA. Sed ili rifuzis kunlaboron, aŭ eksplicite, aŭ implicite per silento malgraŭ plurfoja peto. Ne kulpas do la libro, se personoj havantaj aliajn argumentojn ne deziris/kapablis/povis (la leganto mem elektu la verbon) ilin esprimi. Same ne kulpas la redaktoro, se Lapenna lasis en la movadanoj tian memoron, ke pozitivaj esprimoj tiom abunde superas la kontraŭajn.

Reago

Atenta leganto sendube rimarkis, ke al la demando *Kio vere okazis dum la Hamburga UK en 1974?*, kiun la recenzinto opinias nerespondita en la verko, male respondas almenaŭ deko da paĝoj en diversaj eseoj verkitaj de tute malsamopiniaj personoj, tiel ke la bildo estas tre diversflanke prezentita. Kaj la demandon *Kiuj el liaj ideoj ankoraŭ estas vere gravaj?* respondas la fakto, ke grandega plimulto de la eseoj estas verkitaj pli ol jardekon post lia morto. Pri unu punkto mi agnoskas, ke la recenzinto pravas: la verko nur du-trifaze traktas la rilatojn de Lapenna kun siaj du mortintaj edzinoj. Senkonsidere al la fakto, ke eltombaj eseoj estas malfacile stimuleblaj, restus ĉiukaze la demando, ĉu privata temo, en esaro memore al homo kies graveco estis publika, interesus la legantojn.

Carlo Minnaja

Strategia Forumo

Kiel scienco helpu nin – kiel ni helpu al la scienco?



Sen praktika apliko Esperanto ne ekzistus. Sen scienca agado per kaj por nia lingvo en la diversaj kampoj, Esperanto apenaŭ havos estontecon. En la lingvo-komunumo ŝajne ekzistas certaj hazitoj pri sistema scienca agado kaj iuj duboj pri ĝia neceso. Do, necesas ŝanĝi tion.

Esence temas pri du aspektoj:

a) Por pli bone solvi multajn problemojn, gravajn por la praktika apliko, necesas pli bona scienca agado en la lingvo-komunumo mem (interna aspekto).

b) En medioj ekster la Esperanta lingvo-komunumo regas mitoj, misinformoj, distordoj kaj informvakuoj pri nia lingvo, inter ili aparte en opini- kaj decid-influjaj medioj de sciencistoj. Ankaŭ tie necesas scienca kunlaboro kaj informado (ekstera aspekto).

La serio de strategiaj forumoj kadre de la Universala Kongreso estas kreita por komune debati kaj solvi fundamentajn problemojn de la agado per kaj por Esperanto en la ŝanĝiĝanta mondo. La ĉi-jara *Strategia Forumo* havos la kadratan temon *Kiel la scienco helpu al ni – kiel ni helpu al la scienco*?

La celo de la Forumo estas doni al interesatoj la eblon prezenti, kian rolon ludas scienco en kaj ekster fakaj asocioj kaj en aliaj Esperantaj medioj.

La Forumo do celu:

– prezenti spertojn, problemojn kaj defiojn pri la kontakto kun neesperantistaj sciencaj medioj

– informi, ĝis kiu grado Esperanto rolas kiel praktika ligilo inter sciencistoj (por komuna esplorado, por interŝanĝo de informoj ktp)

– debati pri la rolo de sciencaj aŭ sciencproksimaj institucioj en Esperantujo

kaj per tio

– ebligi spert-interŝanĝon, kiu pli forte konsciigu la aŭskultantojn pri bazaj problemoj de la scienca politika strategio de la Esperanto-komunumo kaj per tio i.a.

– esplori, kiel UEA kaj aliaj Esperantaj organizaĵoj povus kontribui por pligrandigi la rolon de la scienco.

La kontribuoj estu koncizaj kaj ne superu 15 minutojn.

La forumon gvidos d-ro Detlev Blanke, al kiu oni sendu anoncojn pri kontribu-deziroj.

Adreso: D-ro Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, rete: dblanke.gil@snafu.de, tel.+49-30-54 12 6 33, fakso +49-30-54 56 742

Terminologia Forumo

Ĉiam denove oni legas pri novaj fakvortaroj aŭ pri ĉi-rilataj projektoj. Laŭ kiuj principoj ili estiĝis? Kiujn malfacilaĵojn oni devis venki? Kiuj solvendaj problemoj restis malfarmaj?

Malgraŭ kelkaj esperigaj provoj, tamen pro manko de kompetentaj kaj laborpretaj homoj, UEA bedaŭrinde ankoraŭ ne sukcesis reaktivigi la Terminologian Esperanto-Centron (TEC), kiu ja povus helpi ĉe la solvo de diversaj demandoj, aparte kiel kunordiga, kleriga kaj informa centro pri terminologiaj aktivaĵoj. La temo pri terminologia agado do daŭre restas grava kaj aktuala.

Pro tio, sekvante la deziron de la Komitato de UEA, kadre de la UK en Gotenburgo okazos denove **Terminologia Forumo**, sub la kadra temo *Novaj fakvortaroj, novaj projektoj – spertoj, problemoj, defioj*.

La celo de la Forumo estas doni al interesatoj la eblon:

– prezenti siajn laste eldonitajn fakvortarojn,

– informi pri fakvortaraj projektoj prilaborataj aŭ antaŭvidataj

– esprimi sian opinion pri PIV 2 laŭ terminologi-rilata enhavo

– debati pri principaj terminologiaj problemoj

kaj per tio

– ebligi spert-interŝanĝon, kiu pli forte konsciigu la aŭskultantojn pri bazaj problemoj de la terminologia laboro.

Ĉe tio la prelegantoj antaŭ ĉio informu pri la principoj de la elekto de nocioj kaj farado de terminoj, pri redakto-principoj, malfacilaĵoj kaj aliaj problemoj.

La prezentoj estu koncizaj kaj se eble ne superu 15 minutojn.

La forumon gvidos d-ro Detlev Blanke, al kiu oni sendu anoncojn pri kontribu-deziroj.

Adreso: D-ro Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, rete: dblanke.gil@snafu.de, tel.+49-30-54 12 6 33, fakso +49-30-54 56 742

LA GAZETO

MONDKULTURA SENDEPENDA ESPERANTISMA

PETU PROVNUMERON ĈE
LA GAZETO, 55210 CREUSE, FRANCIO

lagazeto@osiek.org
<http://www.lagazeto.com>

Laste aperis

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adreso en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insiginoj k.s. 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimumo 2,25 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>.

80 rakontoj pri la eterne juna 800-jara Rigo. Kompilis V. Teter. El la latva trad. div. Riga: Latvia E-Asocio, 2002. 86p. 21cm. Ilus. Mallongaj tekstoj pri la ĉefurbo de Latvio, uzablaj ankaŭ en kursoj. € 4,50

Al Esperanto. Carlos Vitale, Rolando Revagliatti. El la hispana trad. A. Iannaccone. Buenos Aires: Argentina recitanto, 2000. 16p. 21cm. Tre mallongaj poemoj, en la hispana kaj Esperanto. € 4,50

Diccionario Español-Esperanto/Esperanto-Español. Miguel Gutiérrez Adúriz. Santander: mga, 2002. 474p. ISBN 84 920931 2 9. 17cm. La plej freŝa kaj ĝisdata Esperanta poŝtvortaro por hispanlingvanoj. € 13,50

English as "Tyrannosaurus Rex": how can we preserve other languages from annihilation? Andrea Chiti-Batelli. En la anglan trad. Karen Christenfeld. 2002. 16p. 24cm. Kiel eblas defendi aliajn lingvojn kontraŭ la lingvovora angla? € 2,40

Fabeloj el la budhisma literaturo. Watanabe Aiko. Ilustris Hatanaka Kōkyō. El la japana trad. Yamaguti Sin'iti. Japana Budhana Ligo Esperantista, 2002. 67p. ISBN 4 901651 01 3. 22cm. Bind. Deko da rakontoj plenkoloro ilustritaj. € 13,50

Gerda malaperis! – pagalbina mokymo priemonė lietuvių kalba. Claude Piron. Adaptis T. Pusch, R. Rudaitis. Kaunas: Litova E-Junularo. 40p. 21cm. Vortlito kaj gramatikaj notoj por litovlingvanoj. € 3,90

Graĵo kantas. Vojaĝo tra Helaso. Lucia Barbagallo. El la itala trad. Luigi Tadolino. Venafro: EVA, 59p. 21cm. Poezia vojaĝo al Grekio, tra la tempo, tra la mito, tra la arto. € 8,40

Homoj mangantaj. Hemmi Yō. El la japana trad. Doi Ĉieko. Jokohamo: Mevo-libroj, 2002. 244p. ISBN 4 88887 023 3. 21cm. Kion homoj mangas kaj kion ili pensas? Fama

japana ĵurnalistoj travojaĝis la mondon por ekscii tion. € 13,50

Hristianstvo i esperanto. Ulrich Matthias. Trad. el Esperanto. Kaliningrad: Sezonoj, 2002. 128p. 20cm. Ruslingva versio de *Esperanto – la nova latino de la eklezio*. € 6,60

Karlo. Edmond Privat. En la japanan trad. Itabasi Tutomu, Koyama Takesi, Yamazaki Masaru. Joko-

Kvina evangelio. La. Rudolph Steiner. El la germana trad. Willy Nüesch. Berno: La tradukinto, 2002. 102p. 21cm. Ses prelegoj pri "ankoraŭ ne skribita" evangelio (okt. 1913 – feb. 1914). € 12,00

Legendo de Dorm-valeta. La. Washington Irving. El la angla trad. Edwin Grobe. Tempe: Arizona Stelo, 1998. 24p. 22cm. € 2,40

Mirinda vojaĝo de



hamo: Mevo-libroj, 2002. 128p. 21cm. Facila legolibro kun ĉefanka traduko en la japana kaj komentario japanlingva. € 6,60

Konciza etimologia vortaro. André Cherpillod. Roterdamo: UEA, 2003. 503p. ISBN 92 9017 082 4. 21cm. La etimologio de pli ol 15 000 Esperantaj vortoj, kun parencaj etimoj en pluraj lingvoj. Ĉiuj fremdlingvaj vortoj skribitaj en la alfabeto de la koncerna lingvo. € 19,80. Triona rabato ekde tie ekz.

Nils Holgersson, La. Selma Lagerlöf. El la sveda trad. Sten Johansson. Chapeco: Fonto, 2002. 614p. 21cm. La plej vaste konata sveda libro pri bubo, kiu faris mirindan vojaĝon. € 25,50

Plansprachen und ihre Gemeinschaften. Red. Detlev Blanke. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik, 2002. 161p. ISSN 1432 3567. 30cm. Germanlingva. Dekvino da kontribuaj al la jara



kunveno de la Asocio por Interlingvistiko, 23-25 novembro 2001. € 18,90

Raportoj el Vjetnamio. Tiel ili travivis la militojn. Div. aŭtoroj. Kompilis kaj trad. en la japanan Saiki Akira. Ōi-tyō: La kompilito, 2002. 183p. 21cm. Dulingva (Esperanto, japana). Ilus. € 15,00

Rusaj kantoj kaj romanoj. Red. Boris A. Zozulja. Rostov-Don: Verda kukolo, 2002. 35+29+37p. 30cm. Tri kajeroj kun po 10 kantoj (teksto kaj notoj). € 15,00

Silezio – mia amo. Moja miłość – Śląsk / Schlesien – meine Liebe. Alicja Lewandowska-Quednau. Piastów: J.W. Pióro, 2000. 108p. ISBN 83 88428 00 4. 21cm. Prelegserio pri diversaj aspektoj de la Silezia provinco, kun ilustraĵoj. € 4,50

Tri noveloj. Edgar Allan Poe. El la angla trad. E. Grobe. Tempe: Arizona Stelo, 1998. 22p. 22cm. Tri mallongaj noveloj. € 2,40

Vivo kaj agado de d-ro Hideo Shinoda – patro de UMEA. La. Red. Włodzimierz Opoka. Krakovo: UMEA, 2001. 32p. ISBN 83 908748 4 9. 21cm. Kolorilus. € 3,30

Vortfarado en dek lecionoj. La. André Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, 2003. 24p. ISBN 2 906134 57 0. 21cm. Lecionoj "speciale por la malgramatik-emuloj". € 3,60

VIDBENDOJ, LUDOJ KOMPAKTDISKOJ

Balonfesto. Kevin kaj Malcolm Jones. Trad. el la angla. Wrexham: Eko Publications, 2002. 20 min. Profesia vidbendo pri unu inter la plej popularigitaj sportoj; kun 8-paĝa akompana broŝuro. € 24,90

Brazilia akvarelo. Vida Jerman. Neven Mrzlečki, muziko. Zagreb: La aŭtoro, 2002. 35 min. Pli ol 20 brazilaj poemoj patose recitataj, kun taĝa muzika akompano. KD. € 18,00

Esperanto-Serio in "Der

RET-INFO Retpoŝta Esperanta-novaĵservo
<http://www.eventoj.hu> ret-info@esperanto.org



Loke

★ **ITALIO:** La Milana Esperanta Grupo ekde 2003 translokiĝis al nova, propra sidejo: Circolo Esperantista Milanese, Via De Predis 9, IT-20155 Milano, Italio. Ĉar ĝi estas iama butiko, oni eniras rekte de la strato post la stratangulo de *Via Bramantino*. La kunvenoj okazas vendrede je la 21h15, krom festaj aŭ aŭgustaj tagoj. Retpoŝtaj adresoj plu validas: esperantomi@infinito.it kaj www.infinito.it/utenti/esperantomi/.

★ **NEDERLANDO:** la asocio *Esperanto Nederland* jam tradicie metas anoncon en ĉiusemajnan senpagan gazeton *Metro*, kiu estas senpage je dispono de trajnvojaĝantoj. La nombro de reagoj kreskas: temas jare pri kelkaj centoj. Pasintjare, post la tiamaj balotoj por la parlamento, gratulante la novelektitojn, *Esperanto Nederland* donacis Esperanto-tradukon de du libretoj de konata nederlanda verkisto Godfried Bomans al ĉiuj parlamentanoj.



★ **POLLANDO:** Silezia Esperanto-Asocio aperigis raporton pri la okazinta 36-a Internacia Esperantista Fariado en Międzygorze. Familia etoso aĝrabligis komunan ripozon kaj multflankan uzadon de Esperanto. La raporto kun fotoj troviĝas ĉe http://vroclavo.republika.pl/fariado_en_Miedzygorze.

★ **SINGAPURO:** La 7-an de decembro, laŭ iniciato de Tan Koon Hee, naŭ esperantistoj en Singapuro kunvenis por revigligi la aktivadon de Singapura E-Asocio. Dum la kunveno oni elektis novan estraron de SEA: Yong Tek Kong (prezidanto), Tan Koon Hee (vic-prezidanto), Jenny Koh (ĝen. sekretario) kaj Sng Siok Hui (financo). La kunveno difinis klopodon celon en la venontaj jaroj inviti Universalan Kongreson de Esperanto al Singapuro, kaj ekde la jaro 2003 funkciigi E-kurson por multigi la membraron.

★ **KAMERUNIO:** Prezidanto de la landa asocio AEK kontaktis plurajn ministeriojn

per speciale preparitaj dosieroj kun diversaj petoj. Fine de oktobro 2002 li alparolis instancojn pri turismo, paco, ŝtataj lernejoj, la Unesko-representanton en Kamerunio k.s. Al la instancoj li disponigis projekton de rezolucio favora al Esperanto, por la Ĝenerala Konferenco de Unesko, okazonta en 2003 en Parizo.

★ **RUSIO:** La 3-an de februaro en la ejo de la Sankt-Peterburga societo Espero komenciĝis rektmetoda junulara E-kurso. La unuan lecionon ĉeestis 23 ĝeĵunuloj en la aĝo inter 15 kaj 42 jaroj. La kurson gvidas juna, sed jam sperta litova instruisto Eŭgeno Gaus. La kurso povis okazi danke al bonkora subteno de UEA

Fake

★ **BIBLIOTEKOJ:** En aŭgusto 2001 Kultura Kooperativo de Esperantistoj en Brazilo starigis kampanjon Esperanto en la bibliotekoj, kiu celas provizi per E-aj libroj la brazilajn aŭ alilandajn bibliotekojn. Estis senditaj pakajoj kun E-libroj al 14 brazilaj bibliotekoj, unu pakajo kun 40 E-libroj al la naskiĝanta E-movado de Paragvajo, kaj pakajo kun 10 E-libroj (bildvortaro, legolibroj, primovadaĵaj kaj literaturaj verkoj) al Konga Esperanto-Rondo en Kinshasa.

★ **FILMO:** Mallongdaŭra filmo de Adam Gluzinski *La Antikristo* ricevis la unuan premion en la 44-a Internacia Festivalo de la Dokumentaj kaj Mallongdaŭraj Filmoj en Bilbao. La scenaro de la filmo baziĝas sur la rakonto de Endre Tóth Lappar, la Antikristo, kiu aperis libroforme en la samtitola novelaro (Budapeŝto, 1982). Tomasz Chmielik verkis pri tiu filmo artikolon, kiu aperis en la februara (centa) kajero de La Ondo de Esperanto (<http://Esperanto.Org/Ondo> – rubriko *Novajoj*).

★ **ĜEMELAJ URBOJ:** Komisiito de UEA pri ĝemelaj urboj estas Wu Guojiang, Fushun Shiyuuyichang Yanjijusuo, CN-113008 Fushun Liaoning, Ĉinio, retadreso: amikco999@21cn.com. Aperis jam tri Cirkuleroj pri la Ĝemelaj Urboj, kiujn oni povas peti de la komisiito.

★ **STUDI ESPERANTE:** Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo invitas al Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo, kiu funkcias ekde 1991, kaj en 1994 transformiĝis en trijaran (ĉiutagan aŭ

(la ĝen. direktoro Trevor Steele) kaj prezidanto de la societo Espero Anna Butkevič.

★ **SVEDIO:** Ekde la aŭtuno 2003 oni povos studi Esperanton en Stokholma Universitato. La studplano estis aprobita de la estraro de la instituto pri lingvistiko. La kurso okazos en aŭtuno 2003 kaj printempo 2004. La ĉefa lingvoinstruisto estos docento Joakim Envall. Prof. Hartmut Traumnüller instruos la interlingvistikan parton. Eble kontribuos kromaj instruistoj.

★ **ĈINIO:** 43 studentoj el 7 institutoj aŭ fakultatoj de Dalian-Universitato en Liaoning-provinco trapasis fine de decembro 2002 ekzamenon, per kio finiĝis la unua semestro de la lernejoj 2002–2003 por Esperanto kiel nedeviga studobjekto. La studobjekton gvidis s-ro Wang Tailin, vic-prezidantoj de la Fremdlingva Instituto de la universitato kaj Liaoning-provinca E-Asocio (LEA).

eksterĉeestajn) post-maturekzamenan lernejon. Ĝi agas laŭ permeso de la Pola Ministerio pri Edukado kaj en 1996 ĝi akiris la statuson de klerigejo de la Akademio Internacia de la Sciencoj – San Marino. En la studumo lekciis sciencistoj, instruistoj, lektoroj kaj fakuloj ekz. de AIS San Marino, Monda Turismo, Internacia Esperanto-Instituto en Hago kaj Akademio de Bydgoszcz. En la studumo povas studi personoj, kiuj finis 18-an vivjaron kaj havas almenaŭ meznivelan edukitecon. Plena eduk-ciklo daŭras tri jarojn, dum kiuj oni povas akiri naŭ profesiojn laŭ EU-normoj. En la studjaro 2001/2002 studis 180 gestudentoj el 11 landoj. Aliĝoj ĉe Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz, Pollando; informoj telefone aŭ fakse: (48-52) 3461151, rete: turismo@bydg.pdi.net.

★ **KOMPUTILA VORTARO:** Alex Timašov kreis bonege funkciantan programon eVortaro surbaze de la *Esperanto-Rusa vortaro* de Bokarev, troveblan rete ĉe <http://www.esperanto.mv.ru>. Temas pri vera komputila vortaro, kun multaj tipaj oportunaĵoj: ĝi aŭtomate trovas, tradukas kaj en vindaŭzo pleto montriĝas per verda steleto, kiam ajn elvoklebla per unu klako. La programo estas libere uzebla kaj elŝutebla ĉe: <http://www.evortaro.narod.ru>.

★ **AMRI WANDEL,** iama prezidanto de TEJO, profesoro pri astrofiziko en Universitato de Jerusalemo kaj Los Anĝeleso, akademiano kaj profesoro de AIS, nun ofte donas intervjuojn al revuoj



Amri Wandel sur “marsa” foto por gazetara intervjuo pri ekstertera vivo.

kaj parolas en la israela televido pri atingoj kaj celoj de spac-esplorado, pri internacia kunlaboro en spaca esploro, kaj pri la unua israela astronauto en la usona spac-navigilo Columbia. Oni povis vidi lin en la populara programo *Bonan matenon Israelo* kaj en la anglalingva *Novaj-magazino* (kiun oni sendas satelite ankaŭ al Usono kaj Eŭropo). Kiel scienca konsilanto al la projekto *Hejmo sur Marso*, ekspozicio en la Muzeo de Scienco en Jerusalemo (www.mada.org.il), li prelegas ankaŭ pri *Vivo sur Marso: pasinteco, nuntempo kaj estonteco*.

65

Laste aperis

Morgen” 1965-1990, Die. Peter Levsen, Paul Lindner. Berlin: Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des E-Verbandes im Kulturbund der DDR (AAG), 2002. Kompleta kolekto de la artikoloj en/pri Esperanto aperintaj inter 1965 kaj 1990 en la GDR-gazeto *Der Morgen*, plus aldonaj materialoj, en formato legebla per PC. € 15,00

Ĝoo estas facila ludo. Izumidani Masanori. Tôkyô: EGLI. Simpligita kompleto de ĝo-ludilaro, kun E-lingvaj klarigoj. € 10,50

Lingvo por ni, La. Kantas: Kočetkova, Sokolova, Zvereva, Bronŝtejn, Dadaev, Malenko, Obrezkov, Osokin. En Esperanton trad. div. Moskvo: REU, 2002. 55 min. Dueduko da pliaj “oraj kantoj”, popularaj inter rusiaj esperantistoj. KD. € 13,50

Music of David Gaines, The. D. Gaines. Jiří Vydra, eŭfoniumo; Kimball Wheeler, mezosoprano. Woburn: MMC Recordings, 2001. 12-paĝa broŝuro. Du muzikpecoj de usona komponisto: *Konĉerto por eŭfoniumo kaj orkestro kaj Simfonio n-ro 1 “Esperanto”*, kun partopreno de la Moravia Filharmonia Orkestro. KD. € 15,00

Oficiala informilo



DONACOJ 2003 (EUR) ĝis la 31-a de januaro

Kapitalo Afriko: Belgio: E.Brusela Grupo 1000,00. Britio: Anonime 152,91. *Sumo ĉi-jara: 1152,91.*

Konto Afriko: Finnlando: H. Kesälä 20,00; R. Pihälä 20,00. Germanio: M. Gründler 100,00. Israelo: J. Semer 20,00. Italio: Grupo Pistoia 10,00. Nederlando: Anonime 6,50; A. van Velthoven 30,00. Svislando: D. Rooke 50,00. *Sumo ĉi-jara: 256,50.*

Fondaĵo Ameriko: Italio: G. Aquilina 25,00. *Sumo ĉi-jara: 25,00.*

Fondaĵo Azio: Japanio: H. Abe 16,06; M. Aihara 16,06; M. Hirotaka 15,99; H. Kunii 23,98; Y. Kuroyanagi 15,99; Y. Oosaki 15,99; S. Sugiyama 16,06; H. Yamaguti 16,06; T. Unoki 23,98. *Sumo ĉi-jara: 160,17.*

Konto Eŭropo: Germanio: M. Gründler 100,00. *Sumo ĉi-jara: 100,00.*

Konto Etiopio: Aŭstralio: Federacio Kvinslando 100,00. Britio: M. Boulton 10,00. Israelo: J. Giladi 66,43. Italio: C. De Lorenzi 100,00. *Sumo ĉi-jara: 276,43.*

Fondaĵo Canuto: Belgio: N. Kovačić 50,00. Francio: Anonime 200,00. *Sumo ĉi-jara: 250,00.*

Anoncetoj

1 vorto = 1 internacia rpk (€ 0,75). Ni ne respondecdas pri la enhavo. Ripeto ne rajtigas rabaton. Pri korespondetoj zorgas ankaŭ Korespondanta Servo Mondskaŭla, B.P.6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio, www.multimania.com/kosomo.



14-a konferenco de IKEK (komunistoj) okazos en Bankja apud Sofio (23-28.05. 2003). La temo *Komunistaj movadoj en Bulgario kaj la mondo*. Aliĝkoto: 25 eŭroj. Sendu al: Dieter Rooke, Aüssere klus 14, CH-4702 Oensingen, Svislando.

Mariana Todorova Ĝenĉeva (m_gencheva_esp@dir.bg) deziras trovi seriozajn esperantistojn por longdaŭra korespondado. Ŝi ankaŭ ŝatus trovi homojn kaj grupojn, kiuj pretus kunlabori kun E-grupo de 9-10-ajr ĝelernantoj, aŭ kun grupo de plenkreskuloj.

Aktivi-en-UEA! Eŝtis starigita nova retroŝt-grupo de UEA por faciligi enasocian serĉadon de taskoj, projektoj kaj helpantoj. La dissendolisto celas informi pri taskoj kiuj ankoraŭ ne havas respondecdon. Enskribiĝinte vi ricevos la taskopriskribojn kaj povos decidi ĉu vi volas kunlabori. Se vi volas helpi en iu projekto kadre de la UEA-agado, vi povas enskribiĝi al la listo *Aktivi-en-UEA!* per vizito de la retpaĝo [**Konto Espero:** Japanio: M. Aihara 16,06. \(LdP\) Usono: W.R. Harmon 100,00. \(Zaban-e-Salam\) *Sumo ĉi-jara: 116,06.*](http://</p>
</div>
<div data-bbox=)

Fondaĵo Junularo: Belgio: J. C. Thumerelle 5,00. Brazilo: J.F. Furtado 5,40. Ĉeĥio: V. Dvořák 6,75; J. Rýznarová 6,75. Ĉinio: Peng Zhengming (PS) 5,00. Francio: Y. Binet 20,00; M. Bloquel 17,55; M. C. Drevon 7,00; J. Hanin 10,00. Germanio: S. Burkert 5,00; H.-M. Geissner 10,00; M. Gründler 100,00; S. Heintz 5,00; F. Kasper 6,75; D. Marcon 5,00; W. Rohloff 5,00. Hungario: T. Slezák 50,00. Italio: G. Aquilina 15,00. Japanio: T. Oosida 9,45. Latvio: S. Freilande 4,05. Litovio: G. Vileniskienė 2,70. Nederlando: M. Dijkhuijsen 10,00; B. van der Putten 15,00. Pollando: H. Burchardt 9,45. Rusio: N. Gogulina 2,00. Svedio: I. Maier 5,00. *Sumo ĉi-jara: 342,85.*

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Finnlando: Societo Antaŭen (Nepal) 35,00. Svedio: Anonime 50,00. *Sumo ĉi-jara: 85,00.*

Volontula Fondaĵo: Israelo: K. Sicherman 50,00. *Sumo ĉi-jara: 50,00.*

Ĝenerala Kaso: Nederlando: J.M. Niemans-van Beek 50,00. Svislando: D. Buhlmann 31,18. *Sumo ĉi-jara: 81,18.*

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

abonu.com/catalog/esperanto.aktive kaj vi aŭtomate ricevados informojn pri novaj projektoj. Se vi mem volas proponi novan projekton, eblas skribi al taskoj@uea.org (bv. doni titolon de la tasko kaj mallongan sinprezenton).

Ĉiam konstante akceptas korespond-proponojn Japana Esperanto-Korespond-Servo, ĉe KLEG, Sone-higasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, JP 561-0802, Japanio.

Litovio dum jarcentoj estas 144-paĝa libro, kiu celas prezenti la landon de la 90-a Universalna Kongreso en 2005. Oni ne multon scias pri Litovio, kies nomo la unuan fojon estis menciita en 1009. En la 15-a jarcento Litova Granda Duklando estis la plej granda regno en Eŭropo! La abunde ilustrita libro de Petras Čeliauskas estas aĉetebla en la Oficejo de Litova E-Asocio kaj en la Libroservo de UEA, libroservo@uea.org. La prezo estas 9 eŭroj.

Ĉe www.uea.org aperis reta mendilo por la 88-a UK en Gotenburg. Eblas trovi ĝin en la parto *Kongresoj – 88-a UK – Reta mendilo*. Apude oni povas konsulti plenan tekston de la *Dua Bulteno*.



Filatelaj kovertoj el Kroatio

En Kroatio aperis okaze de la 5-a Kongreso de Kroataj Esperantistoj kaj la 14-a Konferenco de Alp-Adria Regionoj du unutagaj kovertoj.

Unu koverto surhavas Esperantan poŝtmarkon kaj la surskribon 14-a Alp-Adria Konferenco Rijeka-Kostrena, la dua (sube) havas la saman stampon, sed du diversajn E-poŝtmarkojn.



Temas pri filatela raraĵo, ĉar malofte estas emisiitaj du poŝtmarkoj rilataj al Esperanto por la sama aranĝo.

la kovertojn elbas mendi ĉe:
Kroata Esperanto-Ligo
Kneza Mislava 11/3
HR-1000 Zagreb
Kroatio

Ertl malkontenta

Ni estas bedaŭrinde je la suba parto de eŭropaj landoj koncerne fremdlingvajn sciojn, deklaris, en parolado adresita al la nacio, la hungara ĉefministro Peter Medgyessy.




Lernado de lingvoj estas natura tasko kaj neceso ekde frua infanaĝo. Post la grandaj reformoj de post 1989, kaj ankaŭ pro la baldaŭa membriĝo en Eŭropa Unio, la pozicioj de lingvoj tre ŝanĝiĝis. Generale nun en Hungario oni kompreneble opinias la scion de la angla plibonigenda, sed konscias ankaŭ pri la neceso de la germana, klarigas el Bruselo István Ertl, informdirektoro de la Eŭropa Reto Kontraŭ Rasismo. La registaro deklaras apogi multlingvecon. Sed efektive ĝi celas diri: lernu la anglan, diras malkontenta Ertl, eks-redaktoro de la UEA-organo Esperanto. Laŭ la hungaro, la oficiala sinteno de la registaro rilate fremdlingvojn estas hipokrita.

Marko Naoki Lins

Kie okazos kio?

Kiel trovi Esperanto-renkontiĝojn en najbaraj aŭ aliaj landoj? La listoj laŭ datoj ofte ne multe helpas tiurilate.

Esperantoland kreis la interreto mapojn, sur kiuj estas indikitaj la lokoj de estontaj Esperanto-renkontiĝoj. La rezulto estas trovebla ĉe



www.EsperantoLand.org/renkontiĝoj. La organizantoj povas mem enmeti novan E-aranĝon kaj poste laŭplaĉe ŝanĝi la indikojn helpe de kodvorto. Tiel eblas rapide prezenti sian renkontiĝon interrete, ankaŭ se oni ne disponas pri propra retpaĝaro.

Lu Wunsch-Rolshoven

Japana karto

Japana Poŝta Ministerio emisiis okaze de la 89-a Japana Esperanto-Kongreso 2002 en Hukusima specialan poŝtkarton.

La poŝtkarto estis vendata en 113 poŝtoficejoj, en 50 mil ekzempleroj. Normala poŝtkarto kostas 50 enojn, sed tiu ĉi, sponsorata de Japana Esperanto-Instituto, kostas 45 enojn. Japanaj esperantistoj donacis al tiu reklam-kampanjo 5250 enojn.

Sur la poŝtkarto estas la jena teksto: Mondokomuna lingvo Esperanto estas lingvo por forigi landlimojn en la koro. La desegnaĵon faris Konisi Gaku, la tekston verkis Mutukawa Sumiko.

Tahira Masako



Ĝangalo: Ĉiutagaj novaĵoj en nia lingvo



Flavio Rebelo, la ĉefredaktoro de la portalo Gango
www.gxango.com
<gxango@hotmail.com>

Post preskaŭ unujara laboro, kompetenta kaj talentplena skipo invitas vin viziti la rezulton de siaj streboj – la Esperanto-portalon Gango! – anoncis, meze de januaro 2003 Flavio Rebelo, ĉefredaktoro de la nova ret-portalo Gango.

Ĉiutage la esperantlingva novaĵ-portalo ĉe www.gxango.com raportas pri la lastaj novaĵoj el la tuta mondo – pri politiko, ekonomio, sporto kaj Esperanto. En Gango vi trovos noticojn, artikolojn pri diversaj temoj, elŝutaĵojn, ligilojn, same kiel horoskopon, babilejon, forumon, veter-

prognozon, serĉilon, voĉdonejon kaj multe pli, klarigas Flavio Rebelo.

Gango povos fariĝi la plej granda kaj utila Esperantejo en la reto por la internacia lingvo. Jam post monato pluraj miloj da homoj regule vizitas la ttt-ejon.

Dafydd ap Fergus

Esperanto alvenis al Paragvajo

En januaro 2002 Deolinda Vera López translokiĝis el Rio-de-Janeiro (Brazilo) al la urbo Asunción en Paragvajo, kaj komencis tie gvidi Esperanto-kursojn.

De la 15-a de februaro ĝis la 10-a de aprilo ŝi instruis al membroj de loka Filozofia Centro, poste komenciĝis nova E-kurso, kiu daŭris ĝis novembro 2002. La spertoj instruas ke estas eble ankaŭ por aliaj esperantistoj fari la samon en aliaj partoj de la mondo, se estas por tio konvena momento, bona volo, disciplino kaj amo.



En novembro 2002 Chongqing-a Esperanto-Asocio en Ĉinio okazigis E-kurson en la Chongqing-a Universitato. La prezidanto Yuan Ailin kaj vicprezidanto Zeng Fanyue unue prezentis Esperanton al 400 studentoj kaj instruistoj, kio vekis grandan aplaŭdon kaj intereson pri la poste lanĉita E-kurso.

Esploroj por la estonteco

Sekve de la esploroj devus
aperi konkretaj rekomendoj
pri la plej efikaj vojoj konservi kaj
utiligi por la publiko la librojn
trezorojn de la biblioteko. Tiuj
rekomendoj estos prezentataj al
la fondaĵo, surbaze de kio ĝi
povos decidi pri disponeblo de
signife pli granda sumo por
konservado de la biblioteko.



Kadre de la projekto la 1-an de februaro en la CO eklaboris oficeisto Ziko Marcus Sikosek (Germanio), konata kiel la aŭtoro de unu el la plej diskutataj primovadaĵoj libroj de la lastaj jaroj *Esperanto sen mitoj*. Ziko estas magistro pri historio, ŝtaginta en kelkaj arkivoj kaj bibliotekoj en Germanio. La Biblioteko Hector Hodler estas unu el la plej grandaj Esperanto-bibliotekoj, kun proksimume 20 000 libroj, cetero kun periodaĵoj, manuskriptoj, fotoj, sondiskoj kaj aliaj kolektaĵoj. BHH okupas en la Centra Oficejo tri ĉambrojn, nome Kanado, Aŭstralio kaj Simon Saff. Pliaj Biblioteko Hector Hodler kaj Ziko Marcus Sikosek vi povas legi ĉe www.uea.org. *Servoi – Biblioteko.*

Krucenigma konkurso

La solvojn sendis: Gerrit Brons (Nederlando), Wouter Pilger (Nederlando), Gérard Labasthe (Francio), Pieter Jan Doumen (Belgio), Bert-Horst Schumann (Francio), Sonja Brun (Svislando), Dieter Dungert (Germanio), Anja Launiainen (Finnlando), Edmund Grimley Evans (Britio), Ruben Torres (Kolombio), Jean-Marc Fradet (Francio), Neil MacKilloigin (Britio), Jean-Thierry von Büren (Nederlando), Ronald Cuenot (Francio), Lucien Giloteaux (Francio), Roland Larsson (Svedio), Luiza Marin (Francio), Adayama Tooru (Japanio), Erkki Kempainen (Finnlando), Julian Ducrocq (Francio), Alfonso Soares (Brazilo), M. Paul Lafont (Francio).




Angus Wilkinson (Britio), William R. Harmon (Usono), Katarina Eckstadt (Germanio), Mihailo Nešić (Jugoslavio), Béla Medgyes (Hungario), Grethe Kvist (Danlando), Astrid Birkbak (Danlando), Celio A. S. Brandão (Brazilo), Gardén Sean-Pierre (Francio), Dezusto Frankleno (Nederlando), Nora Caragea (Germanio), Jackie Huberdeau (Francio), Odile Masseron (Francio), Tatjana Auder-skaja (Ukrainio), Karin Lencki (Germanio), José Mauro Proglante (Brazilo), Dieter Rooke (Svislando), Will White (Usono), Jean Pierre Vanden Dalee (Belgio), Jean-François Cousineau (Francio), František Štoviček (Ĉeĥio), Jean-Marie Ries (Luksenburgio), Neal McKown (Usono), Martin Weichert (Svedio), Renato Petrovič (Jugoslavio), Germain Pirlot

UEA	LA UNUA KASITA PRO-VERBO	KANT-MELO-DIOJ	ZERMENTA GRISN POR PARO HIPERON	SIMBOLO DE ALUMENIO	PART DE KORPO AĈ BOTELO	SUBSTANTIVA FINAJO	UEA	LA DUA KASITA PRO-VERBO
SNURA RECTO, BALANC-LITO							SIMB DE FOSFORO, HELA, ENDOLOKVA	
MONTARA CENO (EUROPO /AZIO)						METROBIA, MEPOZICCO, IAM EKE, ZISTANTA		
GRANDA RIVER EN EGIPTO				EPOR DE JURASIO, NORVEGIA, CEPURBIO				
HUVAJO ALPORTITA DE LA EGIPTO					VERTIKALA DIMENSO, VULKANO, EN SICILIO			
INTER-FAKCO DE DOLORO			DISJEDAJE, GRANDI, ESTI, BLANDI, VARMEGA					
SIMBOLO DE BOBO		VERTIKALA LONGA, REGINA, KAŬCERA					NULO, ELE-MENTO (EL)	
FABELAR, CIGAN-TON						KILO-METRO, RESTA, ERIO		
LOGANT DE ISRAELO				POJE PLI, GRANDA, FERMI, BOTELON				
INTIMA KUNTUL, KAMA-RAŬ					RESTAD, VIVANT, FARUNO, KUN AKVO			
SOVETA ARMO			MUZIKA, TEATRAJO, CINTAŬR					
SIMBOLO DE HIDRO-GRONO		POLA URO, DE VISTULO, PILIN DE LA PRATO						
JUVEL-STONO (AGATO)							ADVERBA, FINAJO, MUDO DE LA EUBO	
RAJF JU, REKON-FAKCO, AĈ ESTIMO						PREPO-ZICO, VERDEKA, RADIO		
PRO-DUKTO DE ROBINJO				NGA, MAL-JUNA, DONAC, AL DIAJO				
ALRO, HOLA, TRINKAJO					GRANDA, ABHARA, BEST, MAL-JUNAS			
PARCET, PARTET			ESTOS, KONATA, BONA KOR-POSTAT					
SIMBOLO DE JIDO		KVABIPEDO, MELO, PERIGONA, PEKINOMO					ADJEKTI-VA FINAJO, PEPKO-ZICO	
MAL-DOLGA, KIEL, GALO						JAR-KVANT, SIMB DE BENSIFINO		
INTIMA KORPO-PART				PECO DE, FINUNTRA, KANTISTO				

Aŭtoro: Stano Marček

(Belgio), Werner Bormann (Germanio), Zdeněk Hřel (Ĉeĥio), Kitty Sichterman (Israelo), Manuel Casanoves (Hispanio), Jurij Kivajev (Rusio), Denise Hubert (Francio), Hazel Green (Aŭstralio), Christoph Brandes (Germanio), Milan Smělý (Ĉeĥio), Kees Neef (Nederlando), Anja Karkiainen (Finnlando), Seija kaj Kari Ketunen (Finnlando), Wanderley Vieira (Brazilo), Malcolm Jones (Britio), Ronald Gates (Aŭstralio), Keyhan Sayadpour (Irano), J. Pauluk (Brazilo), Aira Röntynen (Finnlando), Valentin Melnikov (Rusio) kaj Carlos Eduardo de Oliveira (Brazilo). **La libropremioj gajnis:** Anja Karkiainen el Finnlando. – **Elkoran gratulon al la gajninto!**

Lernu el tiu ĉi DISKUTLIBRO POR MALPLI UZATAJ LINGVOJ
unue eldonita de la Eŭropa Buroo por Malpli Uzataj Lingvoj.



Diskutlibro pri malpli uzataj lingvoj de Jordi Bañeres kaj Miquel Strubell. Trad. Edmund Grimley Evans. Rotterdam: UEA, 2002. 59p. 22cm. Prezo: €7,50. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

VORTLUDE KAJ ALUDE

Esperanta frazeologio kiel spegulo de kulturo. Pri la ekesto kaj evoluo de frazeologio en Esperanto kaj aliaj planlingvoj, kompare kun tiuj de etnolingvoj.




Rotterdam: UEA, 2002. 185p. 21cm. Prezo:
€19,80. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

la nigra serio de KLEKS



Ni tostu la verdan fortunon. Georgo Handzlik. KD. 1999. €15,00
 Higieno de l' murdisto. Amélie Nothomb. 1999. 151p. €9,00
 Ulica Zamenhofa. Roman Dobrzyński. 2001. 286p. €7,50
 La lada tambureto. Günter Grass. 2000. 533p. €36,00
 Ebono. Ryszard Kapuściński. 2001. 329p. €22,50
 Marta. Eliza Orzeszko. 1999. 256p. €12,00
 Mondojo. Div. aŭtoroj. 2001. 216p. €16,50



Don Giovanni
la lada
tambureto



Don Giovanni
la lada
tambureto

Don Giovanni
la lada
tambureto



Ryszard Kapuściński

EBONO



Reportage di Africa

Traduzione di
Giovanna Sestini

198 pagine, 1980 lire

ISBN 88-04-30000-0



Elisa Brancato
MARTA

Una sceneggiatura di Elisa Brancato
regia di
Gabriele Salvatores
Dolby Digital 5.1 DTS

SIMPLE LA PLEJ BONA!

SALUTONI! ESPERANTO ADTOPIPAKTE

Audrey Childs-Mee
(1926-1990).
Rotterdam:
UEA, 2002.
Sepa eldono.
234p. 21cm.
ISBN 92 9017 050 6.
Prezo: € 10,80.
Triona rabato
ekde 3 ekzempleroj.



VOJAÇO EN ESPERANTO-LANDO

Boris Kolker
(1939).
Rotterdam:
UEA, 2002.
Dua, revizita kaj
korektita eldono.
279p. 21cm.
ISBN 92 9017 078 6.
Prezo: € 18,00.
Triona rabato
ekde 3 ekzempleroj.



KIEL ĈIUJ KATETOJ



Kiel ĉiuj katetoj. Agnieszka Usakiewicz. El la pola tradukis Wojciech Usakiewicz. Koloraj ilustraĵoj de Aleksander Oczko. Bielisko-Biała: KLEKS, 1993. 64p. 26cm. Ok rakontetoj por familia voĉlegado kaj kunĝuado. € 10,80. Triona rabato ekde tri ekz.

LA BONA ARBO



La bona arbo. Shel Silverstein. El la angla tradukis Victor Sadler. Zagreb: Izvor, 1999. 56p. 22cm. Bindita kun kromkovrilo. Kortusa instru-rakonto komikstforma pri ama sinofero. Prezo: € 9,90. Triona rabato ekde tri ekz.